

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

104-a jaro • n-ro 1249 (7) • Julio-aŭgusto 2011

La 63-a fervojista kongreso en Liberec



**UEA en la
reta mondo**

**Esperantomuzeo
interreten**

**Skoltoj
en Pollando**

**Niaj solenaj
kunvenoj**

Esperanto

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72INGB0000378964
BIC: INGB NL2A)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
BIC: ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org

TTT: www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Enhavo

- 147 ... Malferme: UEA ĉiam pli en la reta mondo (Osmo Buller)
- 148 ... Esperantomuzeo en Vieno iras interreten! (Bernhard Tuidet)
- 149 ... Lernadi, lernadi, lernadi... (Katalin Kováts)
- 150 ... Niaj solenaj kunvenoj: Interasocie ĉe Mediteraneo (Claude Nourmont);
La tutlanda en Rumanio (Aurora Bute)
- 151 ... Pri Morariu dum la sveda (Ulla Luin); La brita (Ivor Hueting)
- 152 ... La tutpollanda en Nowy Sącz (Halina Komar)
- 153 ... Kalendaro 2011–2012
- 157 ... La 63-a fervojista en Liberec (Liba Gabalda)
- 158 ... Recenzoj: Kalle Kniivilä pri *Urbo Goblinsk*
- 159 ... Boris Kolker pri *Bonvenon en nia mondo*; Ionel Oneț pri *La transilvania
nupto kaj La Talpočasisto*
- 160 ... Skoltoj kaj esperantistoj en Pollando (Kinga Nemere-Czachowska)
- 161 ... Laste aperis
- 163 ... Oficiala informilo; Helpo al Esperanto-bibliotekoj
- 164 ... Renesanco de kroataj kongresoj (Josip Pleadin)
- 165 ... Kurso kaj ekzamensesio en Burundo (Mirejo Grosjean);
Florbukedoj memore al la Holokaŭsto (Amri Wandel)
- 166 ... Forpasoj

KOVRILPAĜE: La 63-a kongreso de esperantistaj fervojistoj okazis de la 7-a ĝis
la 14-a de majo 2011 en la nordbohemia urbo Liberec. (Legu pli sur la p. 157).
Foto: Floreal Gabalda.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto (kunordigo, ĝenerala
planado):** Prof. Probal Dasgupta, LRU,
Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road,
IN-700108 Kolkata, Barato;
☎ +91 33 2484 8529;
✉ probal53@yahoo.com.

**Vicprezidanto (kulturo, kongresoj,
edukado):** S-ino Claude Nourmont,
2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim,
Luksemburgo; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado):
S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Między-
narodowa 38/40a m 217, PL-03-922
Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79 21
[h], ✉ +48 6000 51 425;
✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino
Loes Demmendaal, Duikerlaan 160,

NL-2903 AC Capelle aan den IJssel,
Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20;
✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ino Maritza
Gutiérrez Gonzáles, Avellaneda 212, e/
Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana,
Kubo; ☎ (of) +53 7 6489201, (h) +53 7
6498729; ✉ mglez@enet.cu

Scienca kaj faka agado: Prof. Amri
Wandel, 767 Makabim, IL-71799 Modiin,
Israelo; ☎ +972 544 548712; ✉ amri@huji.ac.il.

Eksteraj rilatoj: S-ro Stefano Keller,
Case postale 6034, CH-1002 Lausanne,
Svislando; ☎ +41 76 261 06 09;
✉ kellerstefano@gmail.com.

Observanto de TEJO: S-ro Gregor
Hinker. **Observanto de ILEI:**
S-ro Stefan MacGill.

UEA ĉiam pli en la reta mondo

La ĉeesto de UEA en la virtuala mondo daŭre pliampleksiĝas. Eĉ ne ĉiuj funkciuloj de la Asocio plu konscias pri ĉiuj niĉoj de Interreto, kie UEA troviĝas, nek pri ĉiuj retaj servoj, kiujn ĝi disponigas. Ni do provu fari kronologian superrigardon pri la kresko de nia virtuala pejzaĝo, kvankam ĝi fariĝis jam tiom riĉa, ke la spaco ne sufiĉas por fari tion elĉerpe.

UEA faris la unuan paŝon en la elektronika mondo aprile 1992, kiam la Centra Oficejo ekuzis retroŝton. Komence oni sendis kaj prenis retroŝtaĵojn nur unufoje semajne. Ili estis malmultaj kaj la uzo de tiu nova kanalo, disponigita de la Erasma Universitato, estis peza, sed baldaŭ la uzo komencis rapide kreski. Ĝis 2002 la CO havis unu retadreson, sed en tiu jaro ĉiu oficisto kaj multaj unuopaj servoj kaj fakoj de la CO ricevis apartajn adresojn.

En 1997 UEA rezervis la domajn *uea.org* kaj Kalle Kniivilä kiel komisiito kaj poste kiel estrarano pri informado ekkonstruis kun kelkaj volontuloj la ĉefan UEA-retejon *www.uea.org*, kies adreso plu restas sama. Intertempe ĝia aspekto ŝanĝiĝis kaj baldaŭ ŝanĝiĝos denove, ĉar la ĉefa volontulo pri ĝi, Andrej Grigorjevskij, nun okupiĝas pri ĝia funda renovigo. Propran retejon havas TEJO, *www.tejo.org*, kies unua versio estis kreita en 2001.

En 1998 ekaperis Gazetaraj Komunikoj de UEA, redaktataj en la CO kaj celitaj al movadaj gazetoj kaj aktivuloj. Komence volontuloj adaptis al kelkaj naciaj lingvoj la informojn, kiuj povis esti interesaj ankaŭ ekstermovade, sed nun tio bedaŭrinde okazas tro sporade. Ĉiu ajn povas senpage ekaboni tiun servon ĉe: *www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/index.html*.

Por la ekstera informado UEA havas alian retejon, *www.esperanto.net*, kiun Torben Kehlet starigis en 1996. Post lia forpaso UEA transprenis ĝian administradon en 2002. Nun ĝi proponas informilojn pri Esperanto en 62 lingvoj. Ralph Schmeits en la CO lastatempe okupiĝis pri ĝia ĝisdatigo, sed la nombro de lingvoj povus esti ankoraŭ pli granda kaj la informoj en iuj lingvoj pli aktualaj. (Bv. kontroli la situacion pri via lingvo kaj laŭbezone kontakti la CO!)

Kiam Andrej Grigorjevskij fariĝis estrarano pri informado, en 2001, li tuj komencis okupiĝi pri la evoluigo de retaj servoj. Li ekkonstruis “retan oficejon”, t.e. retejon, kiun ĉefe uzas la CO sed ankaŭ estraranoj, ĉefdelegitoj kaj perantoj por plej diversaj administrataj bezonoj. Meze de 2002 ankaŭ membroj ricevis la eblon fari rete tiajn bazajn aferojn kiel ekz. (re)membriĝi en UEA/TEJO aŭ aliĝi al UK. La Gotenburga UK en 2003 estis la unua, kies kongresanoj povis ankaŭ mendi loĝigon kaj ekskursojn per reta mendilo en la UK-sekcio de la retejo.

La ĉefa avantaĝo de la retaj servoj certe estas la rapideco. Tion spertas ankaŭ la klientoj de la Libro servo de UEA. En 2000 ili



ricevis la eblecon konsulti rete la plenan katalogon. Mendon oni devis ankoraŭ sendi kiel apartan retmesaĝon, sed ekde marto 2004 *katalogo.uea.org* funkcias kiel vendejo, kie la kliento kompilas mendon per klakoj ĉe dezirataj varoj.

Ekde 2005 la ĉefaj servoj de UEA estas atingeblaj en Interreto. Ĉiu individua membro rajtas uzi la “retan Jarlibron”, *reto.uea.org*, kiu fakte estas pli ol la nomo supozigas. Krom la informoj pri delegitoj, estraranoj, komitatanoj k.a. funkciuloj de UEA kaj TEJO, pri landaj kaj fakaj asocioj, kaj krom la eblo rekte kontakti plej multajn el ili, ĝi donas aliron ankaŭ al la revuoj *Esperanto*, *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*. Ĉiu membro rajtas

legi iliajn jarkolektojn ekde 2004; la numerojn de la kuranta jaro povas legi nur la aktualaj membroj. Simile al la Delegita Reto ankaŭ la reto de gastigantoj de TEJO, *Pasporta Servo*, havas interaktivan retejon, *www.pasportaservo.org*. Ŝatantoj de paperaj eldonoj tamen ne maltrankvilu: *Jarlibro*, *Pasporta Servo* kaj la revuoj de UEA kaj TEJO plu aperos ankaŭ presforme.

En 2009 UEA ekhavis paĝon en la socia retejo *Facebook*. En junio 2011 *www.facebook.com/Universala.Esperanto.Ascio* havis jam 2300 “ŝatantojn”, kiuj povas ankaŭ mem afiŝi tie komentojn, fotojn, filmojn k.a. apud la afiŝoj de UEA. Proprajn paĝojn havas ankaŭ TEJO, *Kontakto*, *Pasporta Servo* kaj kreskanta nombro da aliaj servoj kaj agadoj de UEA/TEJO. Malpli populara (120 anoj) restas la UEA-paĝo *http://vk.com/club13861884* en la *Facebook*-simila *Vkontakte*, kun uzantoj ĉefe en Rusio.

Iom antaŭ ol eniri *Facebook*, UEA malfermis “retan kinejon”. En *uea.ipernity.com* eblas jam spekti dekojn da dokumentaj filmoj ekde la unua IJK en 1938 ĝis la plej lasta Malferma Tago de la CO. La filmjurnalo *UEAviva* en *YouTube*, *www.youtube.com/ueaviva*, proponas 10-minutajn filmetojn pri aktualajoj de UEA. Novaj filmoj aldoniĝas laŭ la tempa disponeblo de la volontulo Francisco L. Veuthey, sed tute regulan ritmon (ĉiun unuan kaj trian merkredon de la monato) celas la nova retradio de UEA, kiu funkcias kunlabore kaj kadre de Pola Retradio en Esperanto, *retradio.posterous.com*.

Fine ni ne forgesu la retlistojn. Ankaŭ tiuj ligitaj al UEA jam tiom – verŝajne tro! – multas, ke ne plu eblas nombri ilin. Ekzemple, la *Yahoo*-listo de la Komitato de UEA estis kreita en 1999. Ĝi estas libere legebla por ĉiu, sed nur la komitatanoj rajtas afiŝi en ĝi. Ĉiu membro de UEA rajtas tamen skribi en la *Yahoo*-listo “uea-membroj”, lanĉita en 2000. Kun ĉ. 400 anoj ĝi tamen estas malpli populara ol la diversaj retejoj, verŝajne pro tio, ke ĝiaj diskutoj tro facile turniĝas en ĝenajn disputojn. Pli utilaj povas esti diskutlistoj kaj retejoj pri konkretaj agadoj, ekz. la retejo por kunordigi la gazetaran agadon ĉirkaŭ la ĉi-jara UK, *esperanto.com/gazetara-kampanjo2011*, prizorgata de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova.

Osmo Buller

Esperantomuzeo en Vieno iras interreten!

La valoro de muzeoj konsistas ne nur en la objektoj elmontrataj, sed ankaŭ en la objektoj, kiuj troviĝas en iliaj stokejoj. Tiel en la Esperantomuzeo en Vieno oni povas vidi nur etan parton: 2 500 objektoj troviĝas ne en vitrinoj, sed en stokejoj. Tamen la Esperantomuzeo trovis solvon: Post ciferecigo, granda parto de la objektoj estas nun videbla en interreto!

La Esperantomuzeo ne devas honti: en la jaro 2010 vizitis ĝin 7 523 interesiĝantoj, inter ili multaj lernantoj kaj junuloj. Aldone al tiu sukceso ĝi strebas eĉ pli grandigi la kontakton kun la publiko kaj tiel en giganta fortostreĉo fotis aŭ skanis ĉiujn siajn muzeajn objektojn por meti ilin en la bilddatumbankon “Bildarchiv Austria”. La celata publiko estas interalie ankaŭ la esplorantoj kaj sciencistoj, ĉar objektoj havas sian historion kaj ofte komunikas eĉ pli konkretan informon ol vortoj.

Kolektado, konservado, esplorado kaj disponigo de objektoj estas la bazaj funkcioj de ĉiu muzeo. Tiajn taskojn la Esperantomuzeo plenumas jam de pli ol 80 jaroj. Pro tio la kolekto

kontinue kreskis tiel, ke ĝi nuntempe gardas pli ol 2 500 diversspecajn objektojn el tri jarcentoj. Ĉiu objekto havas sian propran historion, kiu estas dokumentinda. Objektoj ne ekzistas sen signifo, ili ne ekzistas per si mem, sed nur per sia signifo kaj per la funkcio el la tempo de sia estiĝo. Se oni ne ĝustatempe kolektas kaj konservas objektojn, ili perdiĝas kune kun la signifoj, kiujn ili transdonas.

La objektoj en la Esperantomuzeo estas tiel diversspecaj, kiel ilia historio. La listo estus tro longa por nomi ĉiujn specojn. Inter ili estas granda nombro da insignoj kaj glumarkoj de diversaj kongresoj kaj renkontiĝoj, flagoj, pentraĵoj, ŝildoj, kalendaroj, moneroj, medaloj, bustoj kaj diversaj memoraĵoj.

La objektoj estas gardataj en speciala ejo klimatizata kaj alirebla nur por personoj kun speciala permeso. La temperaturo kaj la aera humido estas idealaj por daŭra konservado kaj kongruas kun la plej aktualaj normoj preskribitaj de specialistoj por garantii la savadon de la materialo.

Esperanto-insignoj

Granda parto de la objektoj estas insignoj. La plej malnova insigno estas el la jaro 1908 – de la 4-a Universala Kongreso en Dresdeno, la plej nova insigno estas el 2008 – de la 93-a Universala Kongreso en Roterdamo. La kolektado de la insignoj sekvas certan sistemon kaj celas la plej kompletan kolekton de ĉiu speco de Esperanto-insignoj. Insignoj ne nur estas belaspektaj ornamaĵoj, sed ili estas ankaŭ reprezentad-formoj de la koncernata renkontiĝo, kiuj ofte permesas ekzaktan datadon de historiaj kunvenoj.



Insigno de la 4-a UK, Dresden

La renaskiĝo de Esperanto-monumento

Laŭ iniciato de Johann Geroldinger inaŭguriĝis en 1965, proksime de la stacidomo en Linco, tre impona Esperanto-monumento de la artisto Adolf Kloska (1930-1964). En 2001 oni renovigis la areon – kaj detruis la monumenton, laŭdire erare. La lincaj esperantistoj tamen atingis la restarigon. La skulptisto Herbert Egger sukcese povis rekonstrui la monumenton laŭ la modelo, kiu troviĝas en la Esperantomuzeo. La solena reinaŭguro okazis en 2006. Jen tre drasta ekzemplo por la fakto, ke gravas, ke ie en la mondo ekzistas institucio, kiu konservas kaj gardas ankaŭ Esperanto-objektojn.

La Esperantomuzeo ne nur gardas malnovajn objektojn, sed ĝi ankaŭ aktive kolektas la nuntempajn por montri kaj rakonti al estontaj generacioj la historian signifon, kiun peros la kolektitaj objektoj pri la nunaj Esperanto-vivmedioj.

Pere de la katalogo de la “Bildarchiv Austria” oni povas serĉi kaj trovi la objektojn de la Esperantomuzeo. La ligilo estas la jena: www.bildarchiv.austria.at.

Bernhard Tuidier



La modelo de la Esperanto-monumento en Linz



Insigno de la 93-a UK, Roterdamo

Lernadi, lernadi, lernadi...

Sendube lernado estas esenca bazo de la homa evoluo. Ĝi rilatas ankaŭ al niaj lingvo kaj movado, des pli ke ĉe la plimulto de la lingvouzantoj Esperanto estas lingvo lernita kaj ne denaske alproprigita.

Manke de Esperanto-ŝtato kaj ties kultura infrastrukturo, edukado kaj lernado ne estas alcentrigitaj kaj unuecigitaj. Esperantujo ne povas ebligi al ĉiuj siaj membroj aliron al kleriĝo kaj pluperfektigo, ne disponigas lernejsistemon kun studebloj pri la lingvo, pri kulturo, pri aliaj studfakoj akireblaj en tiu ĉi lingvo.

La membroj kaj asocioj provas kompensi tiujn mankojn diversmaniere kaj -nivele, ofte amatore. Ekzistas movadaj kaj klubaj kursoj, fakrondoj en lernejoj kaj kelkaj universitatnivellaj kursoj. Tiuj ĉi lastaj, eĉ se “internaciaj”, tamen atingebblas nur por homoj geografie proksimaj. Disponeblan solvon por ĉiuj signifas nur la retaj kursoj, inter ili la plej sukcesa *lernu!*, kiu funkcias jam kun 100 mil aliĝintoj, sed sen ajna oficiala agnosko aŭ ekzamen- kaj diplomsistemo.

Ĉu la manko de centreca eduksistemo estas rezulto de ĝenerala malemo lerni Esperanton, lerni pri kaj per Esperanto? Aŭ inverse: ĉu la malmultaj ebloj kaj manko de rekono malinstigas esperantistojn lerni? Eble ambaŭ veras, sekve urĝas ekagi sur ambaŭ kampoj.

Bona kaj kontentiga solvo, pro la geografia diseco, devus esti tamen la distanclernado aŭ distance kunordigata loka lernado, kun unuecaj kaj normaj studprogramoj, ekzamenoj kaj diplomado. Necesus investi kaj pli atenti pri la potenco kaj teknikaj ebloj de ekz. *lernu!* kaj aliaj retaj kursoj, *edukado.net*, RITE (Reta Instruista Trejnado ĉe *edukado.net*) kaj de la ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), ekstermovade agnoskataj. Ili povus garantii bazan



Foto: Gabriel Quéré

K. Kováts, F. Lo Jacomo kun la gastobservanto Renée Triolle ekzamenas la hispanan kandidaton Amador Angel Garcias Santos ĉe la ekzamensesio en Greziljono en majo 2011.

edukprogramon por ĉiuj niveloj, kunlabore kun la lokaj kaj diasporaj klerigcentroj kaj movadaj kursejoj (Poznań, San Diego, Herzberg, universitatoj en Ĉinio, Esperanto-centroj en Afriko ktp), laŭ kune ellaboritaj kaj akceptitaj normoj. Aliaj kursoj kaj movadaj aranĝoj estus nur aldonaj koloroj kaj specialiĝoj, kiuj pliriĉigus la palettron kaj farus la komunumon pli bunta.

Por ke la gvidantaj respondeculoj agnosku la neceson ellabori tian universalan eduksistemon ene de Esperantujo, ke ili zorgu pri klerigado kaj trejnado de sufiĉaj instruistoj kaj kursgvidantoj, necesas ke la membroj esprimu sian studemon per legado, partopreno en kursoj, aranĝoj, jamaj programoj kaj funkciigitaj ekzaminsistemoj, ĉu landnivellaj ĉu internaciaj. Necesus ke esperantistoj sentu internan bezonon flegi sian lingvon, altigi sian lingvonivelon kaj ekkoni siajn historion kaj kulturon.

En la norda hemisfero venos la someraj ferioj kaj aranĝoj, ekde septembro nova lernojararo, kaj en la suda mondparto la longaj vintraj vesperoj ... do, ĉiuj taŭgaj por trovi eblon je lernado, kleriĝo, pluperfektigo.

Jen nur kelkaj el la ebloj: ✓ klerigaj kaj lingvolemigaj programoj dum UK, ✓ Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) en Kalifornio, ✓ bunta programaro en la kulturaj centroj de Greziljono, ✓ Kvinpetalo, ✓ Herzberg, ✓ ĉeesta kursaro de *lernu!* en Slovakio, ✓ pluraj ekzamensesioj de KER kadre de la Tutamerika Kongreso en San-Paŭlo, ✓ hispana kaj itala kongresoj kaj dum UK; ✓ interlingvistikaj kursoj en Poznań (Pollando) komenciĝontaj en septembro, ✓ projekto Universitato de Esperanto sur la ĉina insulo Hajnano.

Por trovi pliajn kursinformojn rigardu la kursejon ĉe www.edukado.net. Ĉiuokaze ne forgesu, ĉar tre gravas: lernadi, lernadi, lernadi... **Katalin Kováts**



Trejnado de la refleksivo dum NASK

Interasocie ĉe Mediteraneo

Inter la 22-a kaj la 26-a de aprilo 2011 okazis interasocia renkontiĝo ĉe Mediteraneo en Sète, en la suda Francio.

La renkontiĝo estis kune organizita de pluraj franclandaj asocioj: *Espéranto-France*, *SAT-Amikaro*, *Franca Fervojista Esperanto-Asocio*, *Franca Katolika Esperanto-Asocio*, *Groupe des Enseignants Espéranto-phones* (grupo de Esperantaj instruistoj), *Eurokka* kaj *Langvedoka-Rusiljona Esperanto-Federacio*. Aliĝis al la renkontiĝo 390 homoj, el ĉiuj regionoj de Francio kaj el dudeko da aliaj landoj.

La agrabla ĉemara fericentro *Le Lazaret*, kie okazis la plej multaj programeroj, estis aparte taŭga pro la eblo loĝi kaj manĝi surloke.

La programo estis abundega. Dum apenaŭ iom pli ol tri tagoj la organizantoj sukcesis kunpaki dek kvin prelegojn, sep spektaklojn, kelkajn atelierojn, forumojn, plenkunsidojn, komitatkunsidojn kaj specialajn laborgrupojn de la invitataj asocioj kaj de kelkaj aliaj partoprenantaj asocioj, sesiojn de ekzamenoj en la kadro de *Franca Esperanto-Instituto* kaj en la kadro de *KER*. Aldoniĝis dek unu ekskursoj en kaj apud Sète.

Esperanto, ĉu solidareca lingvo? Pluraj prelegoj temis pri tiu demando: *solidara turismo en Centra Ameriko*, *peresperanta solidareco en Bosnio*, *kiel Esperanto povas helpi al eksterleĝaj migrantoj en Eŭropo*. Tre kortuŝe rakontis sian sperton *Jozefo*, kiu venis el Afriko kaj sukcesis dank' al helpo de esperantistoj havi nun restadpermeson en Francio. Aliaj prelegoj ebligis konatiĝi kun la foraj kulturoj el Kubo, Nepalo kaj Japanio, kaj kun iliaj nunaj problemoj; eĉ ĉeestis japanino el la damaĝita urbo Sendai. La abundo da programeroj ĉagrenis multajn, ĉar ne eblis ĉion ĉeesti. Necesis elekti inter amaso da interesaj temoj: *Ĉu Esperanto*



estas facila lingvo?, *La humuro ĉe Lorjak kaj Beaucaire*, *Edukado ĉe Interreto*, *Esperanto en politiko*, *Jules Verne kaj Esperanto*, *Vagonara signalado*, prelegoj pri la regiono kie okazis la renkontiĝo..., sen forgesi la forumon pri la okcitana lingvo.

La dokumentaristo *Dominique Gautier* premiere prezentis la novan (franclingvan) filmon "Espéranto". *FAMo* vigligis la interkonan vesperon, kaj akompanis *Jacques Yvart* dum la elstara koncerto pri *Georges Brassens*, unu el la plej famaj "infanoj" de Sète. Dimanĉe sinsekve koncertis la kataluna muzikgrupo "Kaj

Tiel Plu" kaj la frisa ensemblo "Kapriol!" por ĝoje dancigi la publikon; apoteozo estis ĉe la fino de la koncerto kiam ambaŭ ensembloj kuniĝis por muziki kaj kantigi. En la lasta vespero la *Teatra Trupo de Tuluzo* ludis la teatraĵeton *Grandioza Kongreso*. Sekvis *Patric*, kiu bele prezentis kanzonojn en la okcitana lingvo; *jOmO* kantis Esperantan version de kelkaj el ili, antaŭ ol prezenti propran spektaklon kun la dancensemblo *Solniŝka*, brile kaj slavetose. Tiu belega koncerto fermis kunlaborecan kaj memorindan renkontiĝon. Grandioze!

Claude Nourmont

La tutlanda en Rumanio

Inter la 6-a kaj la 8-a de majo 2011, en Sfântu-Gheorghe, distrikto Covasna, Rumanio, okazis la 14-a tutlanda kongreso de Esperanto.

Partoprenis 51 esperantistoj, inter kiuj *Imre Szabó*, la prezidanto de *Hungaria Esperanto-Asocio*, kaj *Klara Szabó*, esperantistino el Hungario. Ne mankis esperantistoj de la aliaj E-asocioj de Rumanio, t.e. asocioj de *Oradea* kaj la fervojistoj.

Krom la estrarkunsido kaj la kongreso mem okazis E-simpozio kun la temo "Esperanto – ponto inter popoloj kaj kulturoj", *ILEI-kunveno* kaj ekskurso.

La solena malfermo okazis en la Liceo "Mihai Viteazul", kie la direktorinoj estas tre favoraj al Esperanto. Ĉeestis ankaŭ liceanoj, al kiuj oni prezentis la Manifeston de Prago kaj mallongan historion de la E-agado en Rumanio. Oni laŭtleĝis gratulmesaĝojn el Bulgario, Hungario, Italio, Meksiko kaj Nederlando, kaj la direktorinoj entuziasme parolis pri

la edukagado en la liceo. Sinjoro Imre Szabó prelegis pri la poeto Attila József (kies patro estis rumandevena) kaj Jozefo Nagy prezentis al ni prelegon pri Sándor Kőrösi Csoma – grava filologo, sikulo¹ el Transilvanio. Prelegojn prezentis ankaŭ Aurora Bute, Mihai Trifoi, Emil Crâncău, Marian Vochin, Petronela Birta, Adriana Dolca kaj Mariana Berariu.

Sabate matene okazis E-kurso, dum kiu Jozefo Nagy parolis pri sia traduklaboro. Kun surpaperaj ekzemploj ni analizis versaĵojn, variantojn, tradukmetodojn, esprimojn, nuancojn, vortojn, vorterojn ktp, kio konsciigis nin, ke tradukado postulas ne nur profundajn lingvosciojn, talenton, sed ankaŭ penan laboron, veran arton.

Ni ekskursis al la proksima vilaĝo Catalina, kie naskiĝis d-ro Gábor Bálint, la unua esperantisto kaj (poste) idisto en Transilvanio. La du prezidantoj, Aurora Bute kaj Imre Szabó, metis florojn ĉe la statuo de d-ro Gábor Bálint, kaj okazis komuna fotado (vidu sube).

Sabaton posttagemeze la membroj de EAR kongresis. Post estrarkunveno oni diskutis pri la agadraporto, pri farendaĵoj, oni elektis novan estraron, kies nova prezidanto estas Mihai Trifoi.

Inter EAR kaj HEA oni subskribis dokumenton, kiu atestas la estontan kunlaboron inter la du E-asocioj. Imre Szabó prezentis la etapojn de la E-ekzamenoj en Hungario. Li montris kiel oni ekzamenas la gelernantojn kiuj elektis Esperanton por ekzameniĝi. Vespere ĉiuj iris en la urbon kaj ĝuis koncertojn, kadre de la Tagoj de la urbo Sfântu-Gheorghe, kiu festis sian 550-jariĝon. La tuta urbo sonoris pro muziko kaj ĉie odoris bonaj tradiciaj manĝaĵoj.

La aranĝo estis vere sukcesa kaj tial ni kore gratulas nian kolegon, nun nian prezidanton Mihai Trifoi.

Aurora Bute



1) Orient-transilvania hungaro

Pri Morariu dum la sveda

Rumana esperantisto, kiu vivis longe en Svedio, estis la temo de libro verkita de Katalin Kováts kaj prezentita okaze de la Sveda Esperanto-Kongreso en Stockholm 13-15 majo 2011.

Kováts faris esploron pri la vivo de Tiberio Morariu, 1901-1987, kaj la libro estis la elirpunkto de ŝia prelego en la sveda kongreso (sur la foto). Ankaŭ la filino de Morariu gastis en la kongreso, kiu kolektis 67 partoprenantojn el 7 landoj.

Alia prelego estis prezentita svedlingve de la lingvisto Mikael Parkvall, kiu faris studon pri komparo de strukturoj de pluraj lingvoj, interalie Esperanto. Wim Posthuma montris filmon pri sia vizito en Togolando.



En la sabata vespero kantis Nataŝa kaj Andreo Bertse. Sveda Esperanto-Federacio, kiu aranĝis la kongreson, elektis novan prezidanton Roland Lindblom, kiu jam en pli frua periodo plenumis tiun taskon, post Bengt Olof Åradsson, kiu nun estos ordinara estrarano. La jarkunveno akceptis prilaboritan statuton, kaj decidis starigi laborgrupon pri libroservo. Krome okazis kunvenoj de la Esperanto-Domo, Eldona Societo Esperanto, sveda sekcio de KELI, kaj ILEI-se. **Ulla Luin**

La brita

Eastbourne (Istburno), estas marborda urbo en la suda Anglio, kie pli ol 80 partoprenantoj ĉeestis la 93-an britan kongreson de la 8-a ĝis la 10-a de aprilo en 'Eastbourne College', konata privata lernejo.

En la ferma bankedo John Wells, prezidanto de Brita Esperanto-Asocio, priskribis la britan kongeson “bela”. Bela vetero en bela marborda loko. Belaj kongresejo kaj etoso. Laŭdojn la organizantoj ricevis ne nur pro la prelegaro, sed ankaŭ pro la aranĝoj.

La temo “lumturoj, lumuloj, lumajoj” fontis el la lumturoj de Eastbourne, kiel Sally Phillips klarigis en sia prelego. Pri ‘lumajoj’ kaj pri lumo mem kontribuis du tre lertaj prelegantoj, John Wells kaj Terry Page, kun fascinaj informoj el vidpunktoj lingva kaj scienca. Ĉu vi scias ke la koloro ‘bluo’ havas por rusoj malsaman signifon ol por angloj? Aŭ ke la tuta spektro de videbla lumo okupas spacon apenaŭ rimarkeblan, kompare kun la spektroj de, ekzemple, ikso-radioj aŭ la ondoj uzataj por televido kaj radiofonio?

Tim Owen enlumigis al la kongresanoj la nunan komputilan Esperantan mondon kaj Paul Gubbins klarigis pri sia redakta laboro por “lumiga antologio” de anglaj tradukoj de Esperantaj verkoj, eldonota, espereble, en 2012. Sabaton vespere estis la vico de Paul la aŭtoro, kiam Peter Bolwell kaj Sally Phillips rolis en lia rimarkinda teatraĵo *Voĉoj*.

Komencantojn prizorgis Jack Warren kaj kelkaj voluntuloj, kaj Kimie Markarian instruis ilin pri la mirinda arto de ‘sorabaneca mensa kalkulado’.

Pri raraj registraĵoj de ‘lumuloj’, kiuj inkluzivis Lapenna, Auld, Goodheir kaj Zamenhof mem, parolis Ivor Hueting, kiu promesis fari KD-ojn kaj poste distribui informojn por interesatoj.

Dum la malfermo en la urbodomo la loka parlamentano, antaŭnelonge elektita, tiel entuziasme subtenis la kongreson, ke li faris prelegeton tute en Esperanto. Kun la helpo de la du kongres-organizantoj – unu tradukis lian verkitan tekston, la alia trejnigis lian prononcadon – liaj vortoj estis bone kompreneblaj. Post la fino de la kongreso oni transdonis la standardon al la estonta kongreso en Edinburgo. Do en tri jaroj la kongreso estas en la tri britaj landoj: Kimrio, Anglio kaj Skotlando!

Ivor Hueting

La tutpollanda en Nowy Sącz

Tutpollanda Esperanto-Kongreso okazis en la intermontara urbo Nowy Sącz, 100 km de Krakovo, de la 30-a de aprilo ĝis la 7-a de majo 2011.

La Kongreso, en kiu partoprenis 169 personoj, estis okazo por festi tri lokajn jubileojn: 105 jarojn de Esperanto en la urbo, 105 jarojn de la asocia gazeto *Pola Esperantisto*, kiu estas redaktata kaj presata en Nowy Sącz, kaj 55 jarojn de la revivigo de la tiea Esperanto-klubo post la dua monda milito.

La programojn gvidis la plej meritaj personoj de la pola Esperanto-movado: Ilona Koutny, Zbigniew Galor, Lidia Ligęza, Roman Dobrzyński, Tomasz Chmielik, kaj eksterlandaj gastoj Zsófia Kóródy, Zlatko Tišljar kaj Petro Baláž, kiuj traktis temojn pri edukado, instruado, informado, monakirado, partnereco kunlaboro kaj propagando. Marian Zdankowski gvidis kvizojn pri Esperanto kaj pri la gastiganta regiono. Pri la rolo de filmo por Esperanto prelegis Roman Dobrzyński, Przemek Wierzbowski kaj Andrzej Sochacki, la uzadon de modernaj iloj por informado, varbado, instruado kaj en la Esperanto-agado proksimigis Petro Baláž. Pri Esperantaj kursoj kaj verkado de gazetartikoloj parolis Stano Marček. Zlatko Tišljar rakontis pri novaj partneraj projektoj de financado por niaj organizaĵoj. Antaŭ granda enurba manifestacio kun kantado de la Eŭropa Himno li prelegis pri la ideo de himno en nia lingvo, kaj el la granda ekrano salutis



Parto de la partoprenantoj antaŭ la urbodomo

kaj deziris sukceson (en la pola kaj Esperanto) la pola eŭroparlamentano Margareta Handzlik.

Okazis manifestacio sur la centra urba placo ĉe la urbodomo, kien venis korusoj kaj soldata orkestro, reprezentanta karpatan grupon de landlimaj gardistoj. La ĉeestantojn salutis la urbeŝtrino Bożena Jawor kaj en la nomo de EEU Zlatko Tišljar. Junularo el liceoj kun flagoj de EU-landoj montris dum la spektaklo la naskiĝon de la 12 oraj eŭropaj steloj. Korusoj kantis la himnon de Eŭropo en Esperanto kaj en la pola. Tia estis la festado de la Tago de Eŭropo kaj la premiero de la publika prezento de la Eŭropa Himno en la neŭtrala lingvo.

La Kongreso allogis eksterlandajn artistojn Manŭel el Italio, kiu prezentis sian diskon *Duonvoĉe... tutkore*, kaj

jOmO, kiu dum sia koncerto dancigis la publikon. Polajn artistojn reprezentis Joanna A. Clifford, Anna Buda, Leokadia Rózik, Jeremiasz Ratajczak, Lidia Ligęza kaj Krystyna Dulak-Kulej. Sian spektaklon *Ludoviko Lazaro* majstre bildigis Jerzy Handzlik. Helena Biskup prezentis la monodramon de Carlo Migliucci *Doktor Esperanto*.

La plej grava arta atingo de TEK estis la premiera spektaklo de *Roma Triptiko*, de la teatro ĉe la urba kulturcentro.

Por la kongresanoj ludis granda simfonia orkestro kaj la urbestro invitis la kongresanojn al koncerto kadre de Festivalo de Eltrovita muziko, kaj regalis ilin per grandega torto por 200 personoj.

La lasta tago estis dediĉita al la ĝenerala kunsido de PEA, kiun partoprenis 27 delegitoj. Ili liberigis la antaŭan estraron kaj elektis la novan, kiu gvidos la asocion en la jaroj 2011-2014. La nova prezidanto fariĝis Arkadiusz Zychewicz, la sekretario Paweł Fischer Kotowski, Anna Magier zorgos pri kulturaj aranĝoj kaj Agnieszka Mozer pri la kaso.

La kongresa temo estis “Civitana aktiveco de esperantistoj”, kaj la kongreso confirmis kiom grava estas la ekstera agado de la esperantistoj, ilia partopreno en la socia vivo de la loka loĝantaro, kaj “la arto labori kune”. En Nowy Sącz oni ricevas komprenon kaj subtenon de la loka registaro, tial dum la tuta semajno kaj ankaŭ poste oni pri la kongreso skribis, parolis, fotis kaj filmis. **Halina Komar**



La soldata orkestro, reprezentanta karpatan grupon de landlimaj gardistoj

Fotoj: Andrzej Sochacki

Kalendaro 2011–2012

Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la novembra numero.

Julio:

02: Amika Tago & BAVELO-Migrado en Offenburg, Germanio. Ĉiujara tuttaga migrado en la bela naturo de la Nigra Arbaro. ✉ Baden-Virtembergas Esperanto-Ligo (BAVELO). ✨ <http://esperanto-bw.de/pages/eo/bavelo-arangoj/bavelo-migrado/invito.php>; migrado2011@esperanto-bw.de.

02-10: NASK - Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto en La Jolla, Usono (Kalifornio). ✉ Esperantic Studies Foundation. ✨ <http://esperanto.org/nask/>; eddyellen@aol.com.

03-10: Internacia Junulara Lingvotendaro, IJL en Jászberény, Hungario. Matene lernado, posttagmeze ekskursoj kaj plaĝumado. ✨ <http://ijl.atw.hu/eo.html>; hferenc@pr.hu.

03-13: Renkontiĝo de Amikoj – RA ĉe la maro en Tarhankut, Krimeo, Ukrainio. Venu por ĝui la tempon inter esperantistoj ĉe la Nigra Maro, lerni Esperanton kaj sportumi. ✉ Katerina Arbekova, a/ ja 107, RU-630078 Novosibirsk, Rusio. ✨ www.ra.nsk.ru; katka8@ngs.ru.

03-16: 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. 1-a etapo apud la Vranov-lago. ✨ www.set-lancov.cz; podhradka@volny.cz.

04-13: Dua Esperanta teatra staĝo en Minsko, Belorusio. Dektaga intensa teatra trejnado gvidata de spertaj instruistoj de la Akademio de Artoj de Minsko. ✉ Asocio Morgaŭ la Printempo, 14 rue de la Tour d'Auvergne, FR-75009 Paris, Francio. ✨ www.dlptheatre.net/; morgau.la.printempo@gmail.com.

05-09: Staĝo en Kvinpetalo: Esperanto kaj Turismo. ✉ Kvinpetalo, 15 rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio. ☎ +33 (0) 549 034 314. ✨ <http://kvinpetalo.org/spip.php?rubrique2>; informoj@kvinpetalo.org.

05-15: VI-a Internacia Junulara Arta Festivalo en Sozopol, Bulgario. ✉ Lasto Nikov, Bul. Slivnitsa 204, BG-1202 Sofia, Bulgario. ☎ +35929835084, ☎ +359 888 031350, +359 899 882261. ✨ lasto@mail.bg.

08-12: Esperanto-remtendaro ĉe la rivero Brda en Polio. Bonetosa boatumado en kompanio kun maks. 20 homoj. ✨ <http://remado.esperanto.org.pl/?q=eo;oczyskota@gmail.com>.

09-14: 8-a TAKE, Tutamerika Kongreso de Esperanto en São Paulo, Brazilo. Samtempe



kaj samloke **46-a Brazilo Kongreso de Esperanto** kaj **31-a Kongreso de Brazilo Esperantista Junulara Organizo, BEJK**. ✨ www.easp.org.br/kongreso; sudastelaro@gmail.com.

09-16: 47-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-47) en Priekulj (Ĉesu-distrikto). Temo: "Folkloro dum jarcentoj". ✉ Latvia Esperanto-Asocio, Margarita Želve. ☎ +371 26407174. ✨ www.esperanto.lv; margarita.zelve@gmail.com.



09-17: Jubilea kongreso de Aŭstralia Esperanto-Asocio en Adelajdo. Temo: "100 jaroj de Esperanto en Aŭstralio. Kaj nun?" Prelegoj: H. Tonkin, T. Steele kaj aliaj. Koncerto de JoMo, teatra kaj kanta konkursoj, ekskursoj. ✉ Katja Steele, 143 Caulfield Ave, Clarence Gardens SA 5039, Aŭstralio. ✨ <http://aea2011kongreso.ning.com>; www.sa.esperanto.org.au.

10-13: Esperanta Kinofestivalo en San-Paulo, Brazilo, dum TAKE. ✨ <http://kinofestivalo.org/>.

11-16: Somera Esperantokurso en Lesjöfors, Svedio. Infangrupo kaj 3 niveloj por plenkreskuloj, 6 horoj da instruado ĉiutage kun spertaj internaciaj instruantoj. ✉ Esperanto-Domo, Stiftelsevägen 1, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. ✨ www.algonet.se/~egarden/; egarden@esperanto.se.

12-16: Internacia natur-amika renkontiĝo: Miraklo de dunoj kaj aer-miraĝo en la Suda Gobio, Mongolio. Renkontiĝo en la suda parto de Mongolio, por ekkoni la viv-

kutimojn de kamelbredistoj kaj ĉevalistoj. ✉ Batzaya, P. O. Box 57, MN-10646 Ulaanbaatar, Mongolio. ✨ <http://www.gobitours.com/>; batzaya@rambler.ru.



14-21: 67-a IJK, Internacia Junulara Kongreso en Kievo, Ukrainio. ✉ Ukraina Ligo de Esperantista Junularo kaj TEJO, Mikaelo Lineckij. ☎ +38 (044) 2231255, ☎ +38 (063) 8493193. ✨ www.ijk-67.retejo.info/; ijk-67@ukr.net.

14-21: 77-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) en Olomouc, Ĉeĥio. Temoj: "Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj" kaj "Kiamaniere trovi taŭgajn rimedojn por allogi gejunulojn al studado de Esperanto por plifortigi nian movadon?" ✨ <http://libe.narzan.com/Eseranta%20ligilo/2011/0211.htm>; priborsky@brailnet.cz.

16-22: Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) en la granda ĉefepiskopa ĉefseminario apud la katedralo en la urbocentro de Zagrebo, Kroatio. Jara kongreso de romkatolikaj esperantistoj malfermita al ĉiuj. ✨ www.ikue.org/kong2011/index.htm; IKUE.kroatia2011@gmail.com.

17-23: Pedagogia semajno en la kastelo Grezjono, Baugé, Francio. Seminario kun prelegoj (Esperanto en la oficiala edukad sistemo), intensaj E-kursoj, FEI-ekzamenoj, koncerto. ✉ Kulturdomo de Esperanto, Château du Grésillon, FR-49150 St. Martin d'Arcé, Francio. ✨ http://gresillon.org/spip.php?rubrique_8&lang=eo; kastelo@gresillon.org.



17-23: 44-a ILEI-Konferenco en Kopenhago, Danio. Temo: "Lingva politiko kaj lingvaj

rajtoj en edukado kaj scienca komunikado".
★ www.ilei.info//agado/Kopenhago2011.php.

17-30: 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio, apud la Vranov-lago. 2-a etapo. ✉ (vidu 03 jul).

18-23: Staĝo en Kvinpetalo: Praktikado de la lingvo. Komencantoj kaj 2-a-grada nivelo. ✉ (vidu 05 jul).

18-23: Hamburga Somero 2011 en Hamburg, Germanio. Internacia renkontiĝo "survoje al Kopenhago". Temo: "Hamburgo – mediprotekta ĉefurbo de Eŭropo 2011". ✉ Ralph Glomp, Wandsbeker Chaussee 185b, DE-22089 Hamburg, Germanio. ★ www.esperanto-hamburg.de/hoso; somero@esperanto-hamburg.de.

22-30: Velura Sezono en Jalta, Ukrainio. Postkongreso de IJK-67 dum la 15-a internacia arta Esperanto-festivalo. ★ www.velura.net; jefim_z@mail.ru.



23-30: 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, Danio. ✉ (vidu la kolofonon).

23-30: Alternativa semajno en Grezijono, Francio (ekologio, kuracmetodoj, verda turismo). E-kursoj matene. Vegetaraj manĝoj. ✉ (vidu 17 jul).


23-30: 42-a IIK, Internacia Infana-junula Kongreseto kun la temo "Vikingoj" en Hundested, Danio. Infanoj kaj adoleskaj junuloj amuziĝas en la feriejo "Gallebjerggård" apud la maro, norde de Kopenhago, dum iliaj gepatroj ĝuas la UK-on. ✉ Bert Schumann, 9 rue Couradin, FR-35510 Cesson-Sevigné, Francio. ★ <http://bertosch.free.fr/iik2011/>; infana.kongreseto@gmail.com.

29-31: Segmaŝino-2011 apud Perm, Rusio. Esperanto-tendaro ĉe la konata internacia civitana forumo apud la urbo Perm, Rusio. ✉ Esperanto-klubo de Perm, p.k. 1227, RU-614105 Perm, Rusio. ★ perm@rusio.info.

30 jul-06 aŭg: 3-a Internacia Kulturturisma Semajno (IKS) en Herzberg, la Esperanto-urbo. ✉ Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. ☎ +49/(0)5521-5983. ★ www.esperanto-urbo.de; esperanto-zentrum.de.

30 jul-06 aŭg: Turisma semajno en kastelo Greziljono, Baugé, Francio. Kursoj de la franca lingvo kaj Esperanto matene. Ekskurso al Luar-kasteloj posttagmeze. Koncerto kaj fotoprelegoj vespere. ✉ (vidu 17 jul).

30 jul-06 aŭg: 84-a SAT-Kongreso en Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino. ✉ 84-a SAT-Kongreso, Kralja Tvrtka 19, BA-71000 Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino. ☎/✉ +387-33-205487. ★ www.satesperanto.org; satkongreso@esperanto.ba.



30 jul-06 aŭg: Somera Esperanto-Studado, SES 2011. 4-a renkontiĝo de la lernantoj de *lernu.net* en la urbo Nitra, Slovakio, 90 km de Bratislava. Antaŭtagmeze lernado, posttagmeze ekskursoj, vespere amuziĝo. ✉ Peter Baláž, Vítazná 840/67-A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio. ★ http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/2011/index.php; esperanto666@gmail.com. Filmo pri SES 2010: www.youtube.com/watch?v=5vga6pwgU6s.

31 jul-13 aŭg: 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio, apud la Vranov-lago. 3-a etapo. ✉ (vidu 03 jul).

aŭgusto:

01-06: 4-a INA-Konferenco en Herzberg am Harz, Germanio. La signifo de naturkuracado en la nuna mondo. Prelegoj pri naturkuracado, praktikaj spertoj. ✉ (vidu 30 jul).

01-06: 12-a MIRO, Mirinda Internacia Renkontiĝo en Stara Sušica, Kroatio, en mezepoka kastelo. ✉ KEJA (Kroatia Esperanto-junulara Asocio), ★ keja.hem@gmail.com.

02-09: 61-a Kongreso de Kristana Esperanto-Ligo, KELI, en Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio. ★ cea.polnicky@quick.cz.

06-13: Somera Arbara Lernejo (SALO-6). Kunferiumado de la lernantoj el la ĝemelurboj Góra (Pollando) kaj Herzberg am Harz (Germanio) en la bela arbaramontara vilaĝo Sieber. Lingvolernado kaj ekzercado antaŭtagmeze, posttagmeze ekskursoj al la montaro kaj interesaj lokoj en la regiono, sportado, ludoj, eventoplenaj vesperoj kun muziko, dancado, prezentadoj. Gastoj estas bonvenaj. ✉ (vidu 30 jul).

06-14: 44. Internacia Esperanto-Feriado, IEF, kaj samtempe **2-a Filma Esperantista Feriado, FEF**, en Szczawno Zdroj, Pollando. Internacia arango kun riĉa turisma programo en belega montara regiono, kun lingvaj kursoj kaj filmoj de Roman Dobrzyński. ✉ Silezia Esperanto Asocio, ul. Dubois 3/1, PL-50-208 Wrocław, Pollando. ★ <http://wroclavo.republika.pl/>; wroclavo@poczta.onet.pl.

06-14: Amika Rondo en Nijnij Tagil, Rusio, dediĉita al la urbaj tagoj, kun ekskursoj, amuzaj lecionoj ktp. ✉ Larisa Kuzmenko. ★ www.k9698.narod.ru; klarisa8@yandex.ru.

07-14: Milan Zvara, esperantista turista piedmarŝo en Karpata montaro, Ukrainio. De la vilaĝo Dovhe, kie naskiĝis la fama slovaka esperantisto Milan Zvara, en la Zakarpatsjka provinco, al la plej alta monto de Ukrainio Hoverla. ✉ Volodimir Hordijenko, p/k35, UA-01133 Kijiv-13, Ukrainio. ★ <http://milanzvara.ukrainio.org.ua>; volodomir@ukr.net.

07-15: Somera Esperanto-kursaro de ILEI-Ĉinio en Tianjin-a Fremdlingva Universitato, Tianjin, Ĉinio. Kursaro por trejnado de instruistoj kaj lernantoj. ✉ Han Zuwu. ☎ +86-13516153399. ✉ +86-22-84511237. ★ hanzuwu@hotmail.com.

07-16: 20-a MELA – Memzorga Lagumado en Délegyháza, Hungario. Libere sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbani. ☎ Laca +36-30-2097864, Andi: +36-30-2752068.

08-15: FESTO en la Grezijono-Kastelo, Francio. Junulara renkontiĝo organizata de internacia teamo. Vinilkosmo disponebligis koncertojn dum la tuta semajno, en neforgesebla etoso kun densa vespera programo. Tage ekskursoj kaj prelegoj. **15-24: Post-FESTO:** Festa semajno por infanoj, junuloj kaj familioj. Artaj aktivajoj, sporto, ludoj kaj E-kurso. ★ alekcxo@gmail.com kaj bjokac@gmail.com.



08-18: Rusiaj Esperanto-Tagoj, RET-2011 en Gelengik, Rusio. Tradicia E-renkontiĝo apud la maro, kun feriado, ekskursoj, koncertoj kaj someraj amuzoj en Esperanto-etoso, organizata de E-kluboj de Krasnodar, Soĉi, Gelengik kaj de REU. Vizito al delfinejo, dolmenoj, ĉevalejo, akvoparko kun veturo per kablovojoj. ★ Svetlana Smetanina, svsmetanina@yandex.ru. ☎ +79266083244.

09-13: Staĝo en Kvinpetalo: Altnivela tradukado kun Brian Moon. ✉ (vidu 05 jul).

12-14: Renkontiĝo de iamaj partoprenintoj de Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov, Ĉeĥio. ★ podhradska@volny.cz.

12-15: 1-a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA) en Fremdlingva Universitato Tianjin-a, Ĉinio. Komuna organizado de ĉina, japana kaj korea sekcioj de ILEI por ILEI-membroj, instruistoj kaj lernantoj. ✉ LKK: Han Zuwu. ☎ +86-13516153399. ✉ +86-22-84511237. ★ hanzuwu@hotmail.com.

13-20: 15-aj internaciaj pluezekaj renkontiĝoj en Pluezec. Francio. Kursoj, atelieroj, dancoj, prelegoj, turismado, vesperumoj ktp. ✉ Plouezec-Esperanto, 5 hent toul broch, FR-22470 Plouezec, Francio. ★ www.pluezek-esperanto.net/; pluezek@gmail.com.

15-19: 51-a Somera Festivalo – Kunludo kaj kunstudu en Barlastono, Britio. Du-nivela kursaro kun la eblo turismi aŭ private studi/esplori en la Biblioteko Butler. ✉ Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DTST12 9DE, Britio. ☎ +44-(0)1782-372141. ★ eab@esperanto-gb.org.

15-21: 21-a KISO en Marburg (Germanio): "Ludi, krei, sperti vin mem". ✉ Gunter Neue, Marburga Esperanto-Grupo, Afföllerstr.

19, DE-35039 Marburg/Lahn, Germanio. ✉ www.esperanto.de/KISO/; kiso@esperanto.de.

16-22: IJS – Internacia Junulara Semajno en Esztergom, Búbánatvölgy, Hungario. Tradicia internacia somera renkontiĝo por junuloj. Kun Esperanto-kurso, akvobatalo, tuttaga ekskurso, sportaj konkursoj, kazino kaj aŭkcio. Ne forgesu hejme vian akvopistolon! ✉ Hungara Esperanto-Junularo, MIESZ, Kárpát u. 33, HU-1133 Budapest, Hungario. ✉ hej@ijs.hu.

16-24: Staĝo en Kvinpetalo: Biblioteka ordigado kaj Muzika Staĝo. ✉ (vidu 05 jul).

18-21: Somerfina Renkontiĝo en urbo Pécs, la pasintjara kultura ĉefurbo de Eŭropo en Hungario. ✉ Alfonz Moró, Fervojista Esperantista Klubo, Várady Antal u. 7/c, HU-7621 Pécs, Hungario. ✉ sofiro2011@gmail.com.



20-27: Itala Kongreso en Torino, Italio. La temo: “Kaj nun ni estu Eŭropanoj!” ✉ <http://italakongreso.esperantoitalia.it>; itala.kongreso@gmail.com. Videoj: Torino, pasia urbo: <http://vimeo.com/14586979>. Torino, historia urbo: <http://vimeo.com/14587971>.

22-30: 20-a MELA – Memzorga Lagumado en Délegyháza, Hungario. Libere sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbaniĝi. ✉ (vidu 07 aŭg).

septembro:

02-04: 4-a Somera Universitato kaj renkontiĝo de la aktivuloj kaj simpatiantoj de EDE kaj de iliaj familioj en la la kastelo Grezijono, Francio. ✉ Berto, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné, Francio. ☎ +46 707675455. ✉ www.e-d-e.org/Somera-Universitato-en-kastelo?lang=eo; bertox@free.fr.



05-09: Lerna semajno de Tuluzaj Esperantistaj Fervojistoj apud Tuluzo, Francio. Tri niveloj, manĝoj kaj tranoktoj surloke. ✉ Tuluzaj Esperantistaj Fervojistoj, 44 Rue de Marseillan, FR-31240 L'Union, France. ✉ http://tef-esperanto.over-blog.com/pages/Stage_2011-3963346.html; andmir@wanadoo.fr.

08-11: Internacia renkontiĝo de filatelistoj kaj E-kolektantoj en Prago, Ĉeĥio, organizata de IFA/IREK, kunlabore kun KAVA-PECH, ligita al la internacia Foiro de filatelistoj kaj kolektantoj en Prago. ✉ chrdle@kava-pech.cz.

11: 10a Spiritisma Esperanto-Renkontiĝo

en Rio de Janeiro, Brazilo. ✉ Esperanto-Grupo Lazaro Luiz Zamenhof, Rua Abilio dos Santos 137, Bento Ribeiro, BR-21331-290 Rio de Janeiro, Brazilo. ✉ www.lazaroluizzamenhof.com.br/; contato@lazaroluizzamenhof.com.br.

11-18: EKOTUR 11. Tradicia ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj en Dobřichovice (itineraro en la Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy), Ĉeĥio. ✉ www.kava-pech.cz/trip-ekotur2011e-esperanto.html; chrdle@kava-pech.cz.

16-18: 33-a BAVELO-Seminario en Villingen, Germanio. Internacia aŭtuna renkontiĝo en la sudokcidenta Germanio kun diversnivela E-kursoj, prelegoj kaj bunta programo. ✉ Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo (BAVELO). ✉ <http://esperanto-bw.de/pages/eo/bavelo-arangoj/bavelo-seminario/invito.php>; seminario2011@esperanto-bw.de.



16-18: XI-a Meksika Esperanto-Kongreso en Guadalajara, Jalisco. La temo: La instruado de Esperanto en Meksiko; malfacilaĵoj, defioj kaj proponoj. ✉ www.esperanto-mexico.org/eo/node/546; mek2011@esperanto-mexico.org.

16-18: Renkontiĝo de esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj en Hraščina-Trgovišče, la bieno de Spomenka Štimec. ✉ Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11, HR-10000 Zagreb, Kroatio. ☎ +385 (0)1 461 7550, ☎ +385 (0)1 461 9373. ✉ esperanto@zg.htnet.hr.

16-22: 36-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kun la 37-a Sesio de AIS en Bydgoszcz, Pollando. ✉ Internacia Klubo “Esperantotur”, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. ☎ (+4852) 346-1151. ✉ www.esperanto.bydgoszcz.eu; esperanto-turismo@wp.pl aŭ info@esperanto.bydgoszcz.eu.

22-23: 2-a Interlingvistika simpozio en UAM, Poznań, Pollando. Temoj: Ĉu la E-movado respondas al la defioj de la nuntempo? Moderna lingva priskribo de Esperanto. Modernaj metodoj en instruado de Esperanto. Nuntempa E-literaturo. Novaj planlingvaj projektoj, konstruitaj lingvoj en la interreto ✉ interlin@amu.edu.pl.

23-25: 27-aj ARTaj KONfrontoj en Esperanto, ARKONES, la plej granda sendependa kultura kaj arta esperantista aranĝo en Poznań, Pollando. Malmultkosta partopreno kaj rabatoj por junuloj! ✉ www.arkones.org; Tobiasz.Kazmierski@esenco.org.

23-25: NOREK: La NordOkcidenta Regiona Esperanto-Konferenco en Viktorio, Brita Kolumbio, Kanado. Temo: “Arbaroj, kion ili signifas por la homaro?” ✉ Wally and Olga

du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saanich, V8L 5G5, Kanado. ☎ 250-656-1767. ✉ esperanto@shaw.ca.

29 sep-02 okt: MKR (MontKabana Renkontiĝo) en la montkabano “Valvazorjev dom” apud la urbo Jesenice, Slovenio. MKR estas tradicia Esperanto-renkontiĝo en specifa etoso – en montaro. ✉ www.keja.hr/mkr.html; vanja.radovanovic@ericsson.com.

30 sep-03 okt: 11-a Kafoklaĉo kaj ludoj dum renkontiĝo semajnfina (KoKoLoRES) en Herne, Germanio. Semajnfina aranĝo (ne nur) por ludemuloj, samtempe kurso por komencantoj. ✉ www.krokodilo.de/kokolores/kokolores.php; petra.dueckershoff@esperanto.de.

30 sep-04 okt: TORPEDO-7 en Herzberg, Germanio. Internacia simpozio pri Esperantaj eduk- kaj kulturcentroj, muzeoj, bibliotekoj. Lanĉo de la projekto PUNTO (PartnerUrba Nodo-TeksajO). Cseh-metoda lingvokurso kun Sabine Trenner, specialisto pri la metodo. ✉ (vidu 30 jul).

oktobro:

01-08: 19-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Malgrat de Mar, Barcelona, Hispanio. ✉ Luis Serrano Pérez, Apartado 423, ES-08200 Sabadell (Barcelona), Hispanio. ☎ (+34)93 7275021. ✉ <http://personales.ya.com/semajno>; luis_serrano@ya.com aŭ luis_serrano@mixmail.com.

02-07: Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA) de Boppard ĝis Kaub, Germanio, sur la fama migrovojo “Rheinsteig” (fiksa hotelo). ✉ www.esperanto.de/deb/ema2011.html.

07-09: Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en la urbo Šumperk, Ĉeĥio. ✉ www.esperanto.cz; Tomecek@esperanto.cz.



07-09: Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio apud Seulo en Koreio. La temo “Esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro”. ✉ <http://jei.or.jp/evento/2011/kk>; jek11s@jei.or.jp.

07-10: 30-a Komuna Seminario (KS), kiu jam 30 jarojn kunligas junajn aziajn esperantistojn, en Seongnam, Koreio. ✉ http://eo.wikipedia.org/wiki/Komuna_Seminario; unika@saluton.net.

10-14: Staĝo en Kvinpetalo: Malkovri la Esperantan literaturon. ✉ (vidu 05 jul).

20-23: Rusia Esperantista Kongreso, REK-27 en Ĉeboksari, Rusio. ✉ www.reu.ru/index.php?evento=REK-27; kongreso@reu.ru.

20-23: Internacia Lingva Festivalo 2011 en Ĉeboksari, Rusio. Tradicia aranĝo organizata de esperantistoj por neesperantistoj kaj traktanta lingvajn temojn. ✨ www.lingvafestivalo.org, al.blinov@gmail.com.

21-23: 'Course-You-Can', Barlastono, Britio. Kurso ĉefe por anglalingvaj komencantoj / komencintoj (okazos samtempe kun 'Drondo' – spertuloj kunvenigu nespertulojn!). ✉ (vidu 15 aŭg).

21-23: 'Drondo', Barlastono, Britio. Semajnfina Esperant-lingva diskutrondo pri diversaj temoj (okazos samtempe kun 'Course-You-Can' – spertuloj kunvenigu nespertulojn!). ✉ (vidu 15 aŭg).

23-29: Kieva Esperanto-Semajno en Kievo, Ukrainio. Konatiĝo kun la glora slava urbo kaj partopreno en la informa poresperanta kampanjo. ✉ Volodimir Hordijenko, p/k 35, UA-01133 Kijiv, Ukrainio. ✨ <http://kes.ukrainio.org.ua/>; volodomir@ukr.net.

25-29: Staĝo en Kvinpetalo: Praktikado de la lingvo per Tinĉjo-bildstrioj. ✉ (vidu 05 jul).

26-30: Vikimania en Svitavy, Ĉeĥio. Unika internacia renkontiĝo de E-vikipediistoj kaj interesigantoj pri Vikipedio. ✉ Pavla Dvořáková kaj E@I, Gregorova 2653, CZ-397 01 Pisek, Ĉeĥio. ✨ evikimania@gmail.com.

novembro:

11-13: Semajnfina Esperanto-kursoj en pluraj niveloj en Herzberg – La Esperanto-urbo, Germanio. ✉ (vidu 30 jul).

26: 35-a Malferma Tago de la Centra Oficejo en Roterdamo, Nederlando. Prelegoj, filmoj, prezento de libroj k.a. En la libroservo ĉio rabatita. ✉ (vidu la kolofonon).

decembro:

08-11: Zamenhofaj tagoj en Vilnius, Litovio. ✉ (vidu 16 sep).

09-11: 53-a klerigesio en Herzberg, Germanio: literaturo, historio, didaktiko/metodiko, movadaj konoj. Kun Zamenhof-festo. ✉ (vidu 30 jul).

10: Antaŭkristnaska renkontiĝo en Pisek, Ĉeĥio. ✨ pisek@esperanto.cz.

11: Zamenhoffesto en Oostende, Flandrio, Belgio, kun malvarma tagmanĝo, tombolo, kantado, kvizo ekde la 11:30 horo. ✉ Marc Cuffez, Esperantogrupo La Konko, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, Belgio. ✨ <http://vereniging.nieuwsblad.be/vereniging/esperantogroep-la-konko/>; flandrio@hotmail.be.

11: Zamenhofaj Tagoj 2011 kun Internacia Pedagogia Kurso en Bydgoszcz kaj Toruń, Pollando. ✉ (vidu 16 sep).

27 dec-03 jan: 28-a IF – Internacia Festivalo en Xanten (inter Duisburg kaj la nederlanda landlimo). Kadra temo: Benelukso. Tuttaga ekskurso al Nijmegen, Nederlando. ✉ Hans-

Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. ☎/✉ +49-5624-8007, ✉ +49-171-4964558. ✨ www.internacia-festivalo.de; HDP@internacia-festivalo.de.

27 dec-03 jan: 10-a Novjara Renkontiĝo (NR) en Bitburg, Germanio. Por infanoj, familioj kaj plenkreskuloj. Ĉ. 150 partoprenantoj el deko da landoj. Prelegoj, koncerto, teatraĵo, ekskursoj. Lingvokursoj por komencantoj, konversacio. ✉ EsperantoLand e. V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wicléfstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. ✨ www.esperantoland.org/nr/ EsperantoLand; lu.esperantoland@gmx.de.

28 dec-02 jan: Alternativa jarfina programo de Interkultura Centro Herzberg SANO-2 post la sukcesa unua tia vintra renkontiĝo en la lasta jaro: ekskursoj, migrado, sportoj, joko, naĝado, saŭnumado, manlaborado, lingvoekzercado, muziko, distraj programeroj. ✉ (vidu 30 jul).



januaro:



08: E-gården-Jarkunveno en Lesjöfors, Svedio, je la 14-a. Ankaŭ diskuto pri planoj por la estonteco de la domo. ✉ Esperanto-Gården, Stiftelsevägen 1, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. ✨ www.esperanto.se; egardenlfs@gmail.com.

09-12: 7-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado en Iksan, Suda Koreio. Esperantista Asocio de Ŭonbulismo okazigas renkontiĝon kun diversaj programeroj, en kiu oni povas praktiki meditado, fari komunan ekskurson al vizitindaj lokoj, sperti korean kulturon, ekkoni ŭonbulismon. ✉ Esperantista Asocio de Ŭonbulismo, Koreio. ✨ www.uonbulismo.net; esperanto@saluton.net.

13-15: 'Ni festivalu!' kaj 'Drondo'. Semajnfina aranĝo en Barlastono, Britio. Staĝo pri Esperanta teatro kaj diskutrondo (por progresintoj) pri diversaj temoj. ✉ (vidu 15 aŭg 2011).

13-15: 'Drondo', Barlastono, Britio. Semajnfina Esperant-lingva diskutrondo (por progresintoj) pri diversaj temoj. ✉ (vidu 15 aŭg 2011).

28-30: Nacia kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio kun prelegoj, ekskursoj, kursoj ktp en Rotorua, Nov-Zelando. ✨ www.esperanto.org.nz.

februaro:

25 feb-03 mar: Mediteranea Esperanto-Semajno

en Résidence Val d'Esquière, Les Issambres, Francio (Lazura Marbordo). Trinivelaj E-kursoj, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo. ✉ Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR-83700 Saint-Raphaël, Francio. ☎ 0033 (0)4 94 83 06 88. ✨ prezmoni@hotmail.com.

aprilo:

27 apr-01 maj: Krokodila Renkontiĝo 2012 en Arrout, Francio. Kvar tagoj da umado en Pirenea montara vilaĝo. ✉ Christophe Chazarein, 98 rue Riquet, FR-31000 Toulouse, Francio. ✨ <http://krokodila2012.wordpress.com>; krokodila2012@gmail.com.

28: 36-a Malferma Tago de la Centra Oficejo en Roterdamo, Nederlando. Prelegoj, filmoj, prezento de libroj k.a. En la libroservo ĉio rabatita. ✉ (vidu la kolofonon).

29 apr-09 maj: 24-a Aroma Jalto en Jalto, Ukrainio. E-festivalo kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de la partoprenantoj kaj konatigi ilin kun belega naturo de Krimeo. ✉ Volodimir Hordijenko, p/k 35, UA-01133 Kijiv, Ukrainio. ✨ <http://aromajalto.ukrainio.org.ua/>; volodomir@ukr.net.

majo:

16-20: Printempa BARo 2012 en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. ✨ www.krokodilo.de/baro/baro.php; andim@gmx.li.

19-21: 9-a MEKARO, Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto en Kebeko, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. ✉ Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado, H2G 2R8. ✨ informo@esperanto.qc.ca.

julio:

14-20: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy, Ĉeĥio. Tutsemajna aranĝo kies temo estos "Sciencfikcia literaturo kaj robotoj". ✨ www.kava-pech.cz/iek; chrdle@kava-pech.cz.

27 jul-04 aŭg: 97-a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo, Vjetnamio. ✉ (vidu la kolofonon).

Mapo de E-aranĝoj troviĝas ĉe:
www.Esperantoland.org

Aktuala listo de konataj E-aranĝoj daŭre konsulteblas ĉe:
www.eventoj.hu

La 63-a fervojista en Liberec

Ĉeĥaj esperantistoj preparis por fervojistoj eksterordinare bonan IFEF-kongreson en la bela nordbohemia urbo Liberec. Partoprenis ĝin 173 esperantistoj el 18 landoj.

La dimanĉasolena inaŭguro komenciĝis per dancoj kaj kantoj fare de la lernejana infangrupo “Jizerka”. Sur la podio, ornamita per la slogano “La reloĵ ligas la landojn, Esperanto la popolojn”, eksidis gravuloj, kiuj salutis kaj bonvenigis la ĉeestantojn. Sekvis salutoj de landaj sekcioj de IFEF, kaj oni legis salutmesaĝojn kaj bondezirojn. Pro siaj meritplenaj agadoj por IFEF estis honorigitaj s-ino Anna Abelovská, kiu zorgis pri bona disvolviĝo de la kongreso, la prezidanto de LKK s-ro Ladislav Kovář kaj s-ro Jindřich Tomíšek, kiu konstante kontribuas al diversaj revuoj per novaĵoj el la fervoja mondo.

Post kantado de la Esperanta himno la prezidantino de IFEF Rodica Todor el Rumanio malfermis la kongreson. Antaŭ la komuna fotado kelkaj partoprenantoj prezentiĝis en siaj fervojistaj uniformoj.

Vespere koncertis la ĥoro “Bendl” el Česká Třebová, kies du membroj Marie kaj Alois Klumpar kongresis kun ni. El Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, venis kvarpersona delegacio kun la urbestro Gerhard Walter, por prezenti la urbon kaj varbi por la venontjara IFEF-kongreso, kiu okazos tie de la 19-a ĝis la 25-a de majo. Ĉe la fino de la kongreso estis transdonita la banderolo kun la listo de la okazintaj kongresoj.



Fotoj: Liba kaj Floreal Gabalda

La bela kaj bunte ilustrita invitbroŝuro konatigis nin kun la vidindaĵoj de Liberec, ĝia ĉirkaŭaĵo, kaj prezentis al ni la ekskursan programon. La kongresa libro enhavis ĉiujn necesajn informojn. En la kongresa teko troviĝis dokumentoj kaj donacetoj de la fervoja kompanio. La urba administracio de Liberec donacis al ĉiuj partoprenantoj senpagan veturadon per publikaj transportiloj dum la kongresa semajno.

La fervojistoj havis okazon en siaj kunsidoj trakti diversajn aktualaĵojn kaj movadajn aferojn. Dum la prelegoj kaj fakaj kunvenoj oni eksciis i.a. pri sekurecsistemoj kaj instalaĵoj, pri trajntrafikregado kaj pri eŭropaj fervojkoridoroj. Estis menciita nova moderna kaj multifunkcia trafik-terminalo en la urbo Česká Třebová, inaŭgurita pasintjare en septembro. Ĝi daŭre ricevas diversajn premiojn.

Bone funkciis la kongresa libroservo, estis eldonitaj E-bildkartoj kaj glumarkoj pri la kongreso. Porokazan stampadon prizorgis oficistinoj de la Ĉeĥa Poŝto. Ĉiutage aperis *Kongresa Bulteno*, el kiu oni eksciis pri okazintaj eventoj. Ankaŭ la ĉeĥa ĵurnalo *Mladá fronta Dnes* raportis pri la kongreso. Radioamatoroj povis radie kontakti siajn kolegojn.

Dum la tri duontagaj ekskursoj la partoprenantoj konatiĝis kun kelkaj historiaj vidindaĵoj de Liberec, pri kiuj

parolis la loka esperantisto Miroslav Kazdera en sia prelego kaj la promeno tra la urbo de li gvidata. Ni vizitis belan botanikan ĝardenon kaj unikan zoo-ĝardenon kun blankaj tigroj kaj aliaj ekzotikaj bestoj. Krome allogis ekskurso al la Valo de Kristoforo. Tie oni admiris astronomian horloĝon kaj romantikan trajnponton. Ne pretervidebla estas la monto “Ještěd” kun sia dominanta telekomunika blank-argenta turo kun hotelo. Tuttaga ekskurso gvidis iujn partoprenantojn al Prago, alia celis viziton de du regionaj kasteloj.

El la vesperaj programoj elstaris la internacia balo kun tombolo kaj abunda bufedo. Ne mankis la tipa ĉeĥa (saniga) likvoro “Becherovka”, kiun ĉiuj povis laŭplaĉe konsumi. Per siaj kantoj ĝojigis nin la famkonata kaj ŝatata jOmO el Tuluzo. Krom li koncertis simfonia orkestro, la ĵaza grupo “Big Band” kaj la popola muzikgrupo “Dudáček”, kiu uzis, krom aliaj instrumentoj, ankaŭ tipan sakluton.

IFEF okazis en Ĉeĥio jam la trian fojon. Grandan dankon al la organizantoj de la ĉi-jara brila kongreso! La impresoj estas bonegaj! Ĉiuj estis ravitaj kaj ege kontentaj hejmenirante kun belaj kaj neforgeseblaj travivaĵoj. Espereble ankaŭ la venontjara IFEF allogos multajn esperantistojn al Herzberg.

Liba Gabalda



Ruska realismo

Urbo Goblinsk. Mikaelo Bronŝtejn.

Moskvo: Impeto, 2010. 304p. 24cm. Bind.

ISBN 9785716102187. Prezo: € 25,80

Se stilekzerci resume, do mi ellegis novan romanon de konata rushebrea verkisto, *Urbo Goblinsk*. Ekde unuaj paĝoj sentiĝas febla aromo de loka dialekto de Esperanto, nome defcito de artikoloj. Eĉ titolo de libro pli prosperus kun tia apendico. Tamen disloke forbalaitaj kvazaŭ per veniko, artikoloj estas hazarde elŝutitaj en lokoj la plej neatenditaj kaj la absurdaj.

Randurben altefonas esperantista ambasadoro, fizike aperas sameksterlanda, dike kalva verkisto. Rusigado de liaj paroloj postulas ŝviton, kaj vodkon sen postmanĝo. Sentineloj de azilo afablas, sed spiningaj fiŝkaptistoj trafita de centprocenta alkoholo apenaŭ ne falas kaj tute ne memorfiksas gravaĵojn.


Iuj vaste viras, en mikrorajonoj okazas batadoj kaj interpafado pro posedo de uzino. Tamen naiva, ĝenema svedo savas junvidvinon de ordinara provinca bandito, kiu alikaze jam devus mallozigi zonon. Fine esperantista eksdirektoro de uzino eklaboras vaĉe en Siberio.

Se seriozi propraproze, eblus miri, ke la revoluciaj ŝanĝoj, dum la lastaj dudek jaroj renversintaj la kernan landon de Esperanto, la Orientan Eŭropon, ĝis nun apenaŭ reflektiĝis en nia literaturo. Jes, en 1997 aperis la novelaro *Falantaj muroj* de Trevor Steele, sed spite ĉiujn siajn meritojn, Steele tamen restas ekstera observanto de la orienteŭropaj revoluciaj realaĵoj.

El la maleksteruloj ĝis nun ŝajne nur Mikaelo Bronŝtejn prilaboris la renversiĝon de la ĉirkaŭa socio en romana formo. Jam malpli ol du jarojn post la disfalo de Sovetio aperis lia romaneto *Oni ne pafas en Jamburg*, en kiu rolas sovetiaj esperantistoj dum la Breĵneva regado de la degeneranta imperio. “Inter beletraj verkoj kiuj parte aŭ tute traktas la vivon en esperantistaj rondoj, *Oni ne pafas en Jamburg* estas unu el la plej sukcesaj, plezure legindaj kaj pensigaj, interalie ankaŭ ĉar ĝi prezentas tiun vivon ne izolita, sed kunligita kun la ekstere sociaj kondiĉoj”, skribis Sten Johansson tiam en recenzo, kiu kun kelkaj modifoj same bone povus temi ankaŭ pri la nova romano de Bronŝtejn.

Same kiel la imagata Jamburg, ankaŭ la urbo Goblinsk situas ie en la nordokcidenta Rusio. Efektive la urbo havas alian nomon. La vorto Goblinsk estas elpensita de sakrantaj, drinkintaj huliganoj, kiuj ripete refaras la nomŝildon ĉe la enveturo al la urbo. La ŝildoŝanĝo ŝajnas simboli la novan, riskoplenan epokon, kiu trafas la loĝantojn en la formo de ekonomia katastrofo, bandita privatigo kaj ĝenerala disfalo de la malnova socia ordo.

Same kiel en Jamburg, ankaŭ en Goblinsk la ĉefa protagonisto estas esperantista inĝeniero en la granda fabriko kiu regas la malgrandan urbon. Ne malfacilas vidi ligan al la fakto, ke ankaŭ



la aŭtoro mem longe laboris kiel inĝeniero en granda fabriko, en negranda urbo, ie en la nordokcidenta Rusio. Tamen, neniel temas pri membiografia verko. Anstataŭe, en la maniero de ĉiuj bonaj verkistoj, la aŭtoro teksis kredeblan ŝtufon el fadenoj rekte spertitaj, el veraj rakontoj de konatoj kaj nekonatoj, kiel li mem klarigas en la enkonduko.

Estas granda merito de Mikaelo Bronŝtejn, ke male ol tro multaj esperantistaj aŭtoroj, li ne elpensas tute novan, neŭtrale sterilan kaj komplete fikcian medion, sed verkas pri realaĵoj kiujn li bone konas. Kiel ĉiam, la faktoj ankaŭ ĉi tie superas la fantaziojn. La ŝanĝoj okazintaj kaj okazantaj en

la orienta Eŭropo dum la vivo de la nuna generacio povus doni indan intrigon al pli ol unu beletra verko, en ĝenroj plej diversaj.

En *Urbo Goblinsk* Mikaelo Bronŝtejn lerte reflektas la sekvojn de la disfalo de la imperio en la ĉiutaga vivo de provinca urbeto, en la funkciado de fabriko produktanta plastajn sitelojn kaj kombilojn, en la privatigo kaj disipado de la fabrika posedado. Unue ĉiuj ricevas akciojn, poste subite mankas mono por pagi salajrojn. Anstataŭ mono la fabriko ekuzas siajn sitelojn kiel pagilojn por aĉeti krudmaterialon, kaj eĉ por subaĉeti vojpolicianojn taŭgas paro da siteloj. Sed aliurbaj banditoj postulas kontantan monon, kaj nur fuĝo savas la fabrikajn kamionistojn.

La lerte teksita intrigo kun diversaj homaj sortoj logas al legado, eĉ se multaj el la karakteroj restas iom surface esploritaj. La rusa kutimo uzi multajn diversajn nomformojn por la sama persono tamen povas konfuzi alilandan leganton, dum la nuancoj de la noma kalejdoskopo restos enigmo por nerusoj.

Ne nur la multeco de la nomformoj transdonas la rusecan etoson. Kiel montras la ja troigita stilekzerco komence de ĉi tiu teksto, la lingvaĵo de Bronŝtejn havas siajn specifikaĵojn. Loka koloro povas esti pozitivaĵo, sed necesus, ke la aŭtoro pli klare konsciu pri tio, kio konsistigas specifikaĵon de la rusa manifestiĝo de Esperanto.

Nun kelkaj trajtoj en la lingvaĵo de Bronŝtejn povas esti iritaj aŭ foje amuzaj por scianto de la rusa, kiu ofte povas laŭvorte retraduki al la rusa, dum por nescianto de la rusa vortoj kaj parolturnoj similaj al “postmanĝi”, “veniko”, “spiningo” aŭ “apenaŭ ne falis” restas galimatio. (“Postmanĝi” estas “zakusit”, manĝi ion kun drinkaĵo, “veniko” estas “venik”, banfasko uzata en saŭno, kaj “spiningo” estas “fiŝkano kun bobeno”, dum “apenaŭ ne falis” estas laŭvorta traduko de la rusa “ĉut ne upal”, en normala Esperanto “preskaŭ falis”).


Tamen la ruseca lingvaĵo estas pardonebla iritaĵo. Pli bedaŭrindas, ke aliaj orienteŭropaj esperantistaj aŭtoroj ĝis nun ne prilaboris siajn vivspertojn de la lastaj jardekoj en literatura formo, helpante nin kompreni, kio finfine okazis en la orienta Eŭropo, en kaj ekster la Esperanto-movado. Ja rigardante malantaŭen ni povas kompreni kien ni survojas. **Kalle Kniivilä**

Kion vi scias pri la Esperanto-mondo?

Bonvenon en nia mondo. Bent Jensenius. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2009. 126 paĝoj. 20 cm. Ilus. ISBN 9788087169117. Prezo: €11,40

Tiu ĉi libro estas trezoro por komencintoj kaj progresantoj. Ĝi estas uzebla kiel perfektiga lernolibro de Esperanto kaj kiel legolibro pri la movado. Kaj ĝi estas tre fidinda. La aŭtoro Bent Jensenius estas profesia instruisto pri fremdaj lingvoj kaj aŭtoro de du lernolibroj (por la angla kaj la germana). Li lernis Esperanton en la matura aĝo de 55 jaroj kaj tuj plonĝis en la Esperanto-mondon. Al sia tasko li rilatis kiel serioza profesiulo kaj li sukcesis.

La libro konsistas el trideko da mallongaj kaj facilaj tekstoj – ĉiuj kun taŭgaj ilustraĵoj – pri movadaj temoj: la Universalaj Kongresoj, la Akademio de Esperanto, La Centra Oficejo de UEA, La Jarlibro de UEA kaj Delegita Reto, Esperanto-literaturo, Kastelo Grezijono, Esperanto en la interreto, Pasporta



Servo, Vikipedio, la gazeto *Monato*, kluba vivo, Esperanto-muzeoj, Internacia Junulara Kongreso, vojaĝoj, internacia korespondado ktp.

La tekstojn sekvas mallongaj kaj facilaj ekzercigaj dialogoj, kiuj plivastigas la samtemajn informojn. Kaj la leciono finiĝas per pensigaj demandoj. Sed tio ne estas ĉio – ĉiun lecionon ilustras kelkaj fotoj, rekte rilatantaj al la pritraktata temo.

La libro finiĝas per unikaj rol-ludoj, tio estas, taskoj por libera konversacio de lernantoj pri 14 temoj el la libro, kiuj celas ekzerci pri libera rego de la lingvo.

Konklude mi ne povas deteni min citi la duonŝercon en la 13-a ĉapitro: “Se vi volas enspezi monon: lernu la anglan. Se vi volas havi amikojn: lernu Esperanton. Kaj se vi estas saĝa: lernu ambaŭ.” Mi emas enmeti tiun sloganon en la antaŭparolon de la estonta nova eldono de mia *Plena lernolibro de Esperanto por ruslingvanoj*. Dankon, Bent, en la nomo de viaj lernantoj kaj de mi persone, kiu ĝuis la libron.

Boris Kolker

De paradizo al infero kaj/aŭ inverse

La transilvania nupto. Stephan Lang. El la nederlanda trad. Gerrit Berveling. Zwolle: VoKo, 2010. 156p. 20cm. Prezo: € 19,50. La Talpočasisto. Stephan Lang. El la nederlanda trad. Gerrit Berveling. Antverpeno: FEL, 2007. 127p. 21cm. ISBN 9789077066353. Prezo: € 18,60.

Stephan LANG naskiĝis kiel LANG István en la hungaria vilaĝo Kálmánd en 1945. Sen translokiĝi eĉ metron, baldaŭ post sia naskiĝo, István ekloĝis en nova vilaĝo, situanta en nova lando, kun nova oficiala lingvo. Kálmánd revenis al Rumanio kaj ricevis la rumanan nomon Cămin. La denaska lingvo de István fariĝis lingvo de “kunloĝanta minoritato”, lingvo eventuale tolerata sed certe ne ŝatata de la majoritato rumanlingva. (Post pli ol 60 jaroj, la situacio ne multe ŝanĝiĝis!)

Tiuj ŝanĝoj – ekster lia volo – estis omenaj por István: 30-jara li fuĝos el la komunisma paradizo (laŭ la loka propagando) al la putra, dekadenta Okcidento (laŭ la sama propagando). Nederlando fariĝos lia adoptlando kaj la nederlanda lia verklingvo. En tiu ĉi lingvo li verkos la du membiografiajn romanojn, kiuj igos lin konata: *La transilvania nupto* (1997) kaj *La Talpočasisto* (2001). Iliaj E-lingvaj versioj, ambaŭ en la traduko de Gerrit Berveling, aperis en inversa ordo: *La Talpočasisto* (2007) kaj *La transilvania nupto* (2010).



Malgraŭ la aperordo de la Esperantaj versioj, estas prefere legi ilin en la sama ordo en kiu ili aperis origine. Ne por sekvi ilian aperordon, sed pro kialo pli grava: la kronologia ordo de la eventoj.

La atentokapta kaj streĉa *La transilvania nupto* okupiĝas pri la lastmomentaj preparoj por “vizito” al Hungario, la “forĝeso” de la aŭtoro reveni al Rumanio, liaj fuĝo al Jugoslavio kaj alveno en Nederlandon, kaj la komenco de nova vivo en nova lando.

La Talpočasisto, same atentokapta sed multe pli trista, portas nin, kune kun la aŭtoro, al la “nova” Rumanio, tuj post la falo de la diktaturo de Ceaușescu. Tie, kune kun li, ni ekscias kiel la ŝanĝoj okazis en vilaĝo rande de la lando, kaj – esence – ni malkovras sekretojn pri la deveno de la aŭtoro, nun fremda en sia naskiĝvilaĝo. La stato de la mortanta patrino aldonas pli da tristo al etoso, cetere, morna.

La aŭtoro ne kaŝas sian antikomunisman kaj ne hezitas piki tiujn okcidentanojn simpatiantajn tiun politikan sistemon. Feliĉe – por ili – ili ne vivas en tia sistemo. Kaj, refoje feliĉe kaj refoje por ili, al ili ne estas malpermesate esprimi sian politikan opinion, malpermeso kiu en la orient-eŭropa “paradizo” estis la regulo. Kun tia regulo, István/Stephan Lang ne povis konsenti. Li forlasis sian denaskan paradizon por alia vivo en la okcidenta “infero”, kie li ja povis libere esprimi sin. En siaj romanoj, eseoj, artikoloj li faris ĝuste tion, kaj tiu (esprim)libero certe ne plaĉas al multaj. Ĉu al vi? Legu kaj decidu mem. **Ionel Oneț**

Skoltoj kaj esperantistoj en Pollando

Inter la 24-a kaj la 30-a de majo okazis la seminario pri interorganiza kunlaboro, organizita de Skolta Esperanto-Ligo kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo en la sidejo de Pola Skolta Asocio (ZHP) en Varsovio. La aranĝon partoprenis 25 homoj el 15 landoj, de Venezuelo kaj Meksiko ĝis Ukrainio. Ĉiuj partoprenantoj kune skizis planon por aplikado de Esperanto en la skolta movado.

Skolta Esperanto-Ligo, fondita en 1918, estas la plej malnova internacia skolta organizo. La seminario estis parto de ĝia reaktiviga kampanjo, entreprenita por plivigligi la agadon de SEL, popularigi Esperanton en la skolta movado kaj la skoltan movadon inter esperantistoj. “Ni bezonas novajn aktivulojn”, diras Guido Ricci, Ĝenerala Sekretario de SEL. “Nia kampanjo konsistas el tri etapoj: informado, trejnado kaj aplikado. Ŝajnas, ke la varsovia seminario permesis plenumi la duan parton.” Ankaŭ por Łukasz Żebrowski, kiu en la Organiza Teamo reprezentis TEJO-n, la popularigado de Esperanto inter geskoltoj el diversaj skoltaj organizoj aperis tre interesa.

Malgraŭ tio, ke ambaŭ organizoj komence ne bone konis unu la alian, dum kelkaj tagoj ili efike kunlaboris. La partoprenantoj prezentis la agadon de TEJO kaj de SEL, ekkonis diversajn stilojn de la interkultura komunikado, prezentis siajn landan kaj internacian agadon en skoltismo kaj en la Esperanto-movado. Tamen la plej grava estis praktika, grupa kunlaboro pri diversaj temoj, kiuj ligas skoltismon kaj Esperanton. Oni multe diskutis pri tio, kiel ambaŭ movadoj povu kunlabori dum la sekva jaro, ekzemple por organizi internacian skoltan tendaron (projekto Ĵamboreo) kun uzo de Esperanto kiel pontlingvo. Fine de la aranĝo la partoprenantoj dividis la unuajn taskojn kaj decidis

plulabori uzante diversajn taŭgajn retilojn.

Grava evento dum la seminario estis akcepto de Rafał Bednarczyk, la internacia komisiito de ZHP, kiu rakontis al la partoprenantoj pri la centjara historio de la pola skoltismo, eksplikis kial post la dua mondmilito oni iel toleris la agadon de skoltismo en Pollando, dum oni ne faris tion en ĉiuj aliaj socialismaj landoj de la Orienta Eŭropo. Oni priparolis kun li la ideon de sekvanta renkontiĝo de skoltoj kaj esperantistoj, ekzemple somera tendaro en Pollando.

Dum la aranĝo la seminarianoj vizitis anojn de la klubo Varsovia Vento kaj ankaŭ Esperanto-budon, organizitan kadre de Scienca Pikniko en Varsovio, kie lokaj esperantistoj popularigis la internacian lingvon inter varsovianoj. La gastoj el 15 landoj estis do bonegaj vivaj ekzemploj de tio, kion pri utileco rakontis la anoj de Pola Esperanto-Asocio.

La partoprenantoj havis ankaŭ la okazon ekkoni Skoltan Asociacion de Pola Respubliko (ZHR), kiu speciale por ili laŭ la skolta metodo preparis grandan urban ludon pri Esperanto. Dum tri horoj kelkpersonaj patroloj ekkonis multajn lokojn en Varsovio, ligitan kun konataj, ne nur polaj esperantistoj kaj aliaj famaj homoj. Ili uzis historian mapon, kovertojn kun diversaj taskoj, kaj poŝtelefonojn por mesaĝi la solvojn. Gajnis la patrolo “Fenikso”, konsistanta el du polinoj, du italoj kaj ukrainino.

La trejnseminarion kun partoprenantoj el la tuta mondo ebligis subvencio de Eŭropa Junulara Fonduso de Konsilio de Eŭropo.

Kinga Nemere-Czachowska

Skolta Esperanto-Ligo,

www.esperanto.org/skolta,

www.facebook.com/skoltismo

La partoprenantoj antaŭ la sidejo de Pola Skolta Asocio (ZHP) en Varsovio. Dekstre Guido Ricci (kun skolta ĉapelo) kaj Rafał Bednarczyk el ZHP.



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

Accusatif en espéranto, L'. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2008. 24p. 21cm. Prezento de la Esperanta akuzativo por franclingvanoj. Kun abundo da ekzemploj. € 2,40

Antaŭparoloj al la Nova Testamento. Erasmo de Roterdamo. El la latina trad. G. Berveling. Zwolle: VoKo, 2011. 84p. 20cm. Tri tekstoj de 1516, kiuj permesas eĉ pli bone koni la pens- kaj labormanieron de la granda filozofo. € 10,50

Comment se comprendre en Europe? Appel à la démocratie linguistique. André Cherpillod. Courgenard: La aŭtoro, 2008. 24p. 21cm. Franclingva. Alvoko al pli justa lingvopolitiko en Eŭropo. € 2,40

Daŭrigo de la Manifesto. Moderna poziciigo de komunisma partio. La programo de la Germana Komunisma Partio DKP. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 63p. 21cm. ISBN 9782918300540. La nuna germana komunista partio heredis la spertojn de siaj antaŭuloj en GDR kaj FRG. € 7,50

Ekonomia krizo. Analizoj n-ro 4. Joachim Becker, Jörg Goldberg. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 52p. 21cm. ISBN 9782918300526. Du eseoj okupiĝantaj pri EU respektive la

lastatempaj krizoj. € 7,80

Esperanto. Jan Bemelmans. Nijmegen: Centrum voor Mondiaal Onderwijs, 2011. 24p. 30cm. Nederlandlingva. De la lingva problemo ĝis ĝia solvo. Kun multe da ilustraĵoj. € 8,70

Esperanto direkt. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la svedan trad. K.-G. Gustafsson. Martin: La aŭtoro, 2011. 114p. 25cm. ISBN 9789185288373. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por svedlingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj. € 7,50

Esperanto é fixe!, O. João José Santos. Lisboa: La aŭtoro, 2011. 44p. 21cm. ISBN 9789899631250. Kolorilustrita enkonduka kurso por portugallingvanoj. € 13,20

Esperanto. Polnoe opisanie i učebnyj slovar'. Andrej Grigor'evskij. Moskva: Impeto, 2011. 31p. 22cm. ISBN 9785716102200. Koncizaj prezento de la lingvo kaj E-rusa vortareto. € 2,40

Esperanto prjamim metodom. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la ukrainan trad. M. Lineckij. Kijiv: La tradukinto, 2010. 114p. 24cm. ISBN 9789662390025. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por ukrainlingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj. € 7,50

Eszperantó nyelvkönyv. György Ódor. La aŭtoro, 2008. 202p. 30cm. ISBN 9789630802444. Plene ilustrita kurso de

Esperanto por hungarlingvanoj, en 16 lecionoj. € 13,50



Frederiko Engelso en aktualaj diskutoj. Werner Seppmann, Erwin Marquit, Karl Hermann Tjaden. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 35p. 21cm. ISBN 9782918300502. Tri artikoloj de tri aŭtoroj. € 7,50

Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn. El la franca trad. J. M. Cash. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 15p. 21cm. ISBN 9782918300472. Ekde la komenco de sia ekzisto, la homo migras. Ĉu oni povas tion haltigi? € 1,50

Inkobotelo de la Esperanta transitiveco, La. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, [2011]. 20p. 21cm. Prezento de la fenomeno "transitiveco" kaj listoj de "problemaj" verboj en Esperanto. € 2,10

Interlingvistiko kaj Esperantologio / Interlinguistik und Esperantologie. Bibliografio de la publikaĵoj de Detlev Blanke / Bibliographie der Veröffentlichungen von Detlev Blanke. Red. Ulrich Becker. New York: Mondial, 2011. 234p. 22cm. Dulingva (E, germana). ISBN 9781595692023. Bibliografiaj informoj pri pli ol 2 000 eroj. € 15,00

Jarkolekto Esperanto 2010. Rotterdam: UEA, 2010. 264p. 27cm. Bind. ISSN 00140635. 11 numeroj. € 30,00. Triona rabato ekde 3 ekz.



Jaro, La. Poŝkalendario 2012. Antwerpen: FEL, 2011. 119+31p. 15cm. € 5,40

Kapitalo, La. Karlo Markso. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 359p. 21cm. ISBN 9782918300304. La ĉapitroj 14-25 de "La produktadprocezo de la kapitalo" – la unua libro de la plej grava verko de Marx, kies influoj sentebblas ĝis hodiaŭ. € 21,00

Kapreolido Pirgo, La. Anđelka Martić. El la kroata trad. J. Katunar. Đurđevac: Grafokom, 2011. 102p. 21cm. Bind. ISBN 9789539697592. Romano pri infanoj, por infanoj. Profunda kondamno de la milito. € 10,50

Kastelo de Miramare, La. En Esperanton trad. L. Fioroni. Milano: La tradukinto, 2009 (2a eld.). 36p. 21cm. Ilus. Prezento de kastelo en Triesto, konstruita meze de la 19a j.c. € 5,70

Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio. Frederiko Engelso. El la germana trad. L. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 57p. 21cm. ISBN 9782918300489. Longa eseo el 1888. € 7,50

Lumo kaj ombro. Petro Vacano. Vác: Asocio Jozefo Kármán, 2009 (4-a eld.). 54p. 15cm. Densa poemaro de hungara poeto-tradukisto. € 3,90

Mafio klarigata al turistoj. Augusto Cavadi. Antaŭparolo de Giuliano Turone. El la itala trad. M. Lipari kaj C. Minnaja. Trapani: di girolamo, 2011. 53p. 17cm. ISBN 9788887778991. Demandoj kaj respondoj pri, probable, la plej fama itala fenomeno. € 6,60

Nomoj kaj sortoj. Júlia Sigmond. Cluj-Napoca: Exit, 2011. 110p. 20cm. ISBN 9786069246030. 12 rakontoj inspiritaj de 12 homoj kaj ilia sorto. € 6,90

Plaidoyer pour l'adoption d'une L.E.U. (Langue Européenne Unifiée). André Cherpillod. Courgenard: La aŭtoro, 2009. 16p. 21cm. Franclingva. Teksto de prelego pledanta por pli justa solvo de la lingva problemo en Eŭropo. € 1,50

Princo ĉe la hunoj, La. Eugène de Zilah. Novjorko: Mondial, 2011. 619p. 22cm. ISBN 9781595691880. Rakonto pri la huniĝo de ĉina aristokrato, pri malfacila adaptiĝo de talenta individuo al alia civilizo, al aliaj homoj, moroj, gustoj kaj odoroj. € 28,50

Problème des langues en Europe, Le, et sa solution... André Cherpillod. Courgenard: La aŭtoro, sj. 16p. 21cm. Franclingva. Ĉu Esperanto povas esti la solvo de la lingva problemo en Eŭropo? € 1,50

Quelle langue pour l'Europe de demain? André Cherpillod. Courgenard: La aŭtoro, 2010. 14p. 21cm. Franclingva. Laŭ la aŭtoro, la plej bona solvo por internacia interkompreniĝo estas la uzo de la neŭtrala lingvo Esperanto. € 1,50

Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio. La Kominterno en la 1930-aj jaroj kaj la koncepte de unueco. Georgo Dimitrofo / Harald Neubert. Enkonduko de Günther Judick. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 113p. 21cm. ISBN 9782918300458. Historia dokumento el 1935 kaj komento al ĝi. € 7,50

Silento. Endoo Ŝusaku. El la japana trad. Doi Ĉ. Tôkyô-to: JEI, 2010. 183p. 21cm. ISBN 9784888870665. Kiam ĉi tiu romano aperis antaŭ 45 jaroj, ĝi ne estis aparte alte taksita de la kristanoj. Ĝia temo estas la farto de kristanismo en Japanio en la unua parto de la 17a jarcento. € 14,10

Stelsemantoj en la ora nordo. Tiberio Morariu kaj liaj samtempuloj. Katalin Kováts. Den Haag: E-duKati, 2011. 159p. 24cm. ISBN 9789078519027. Rigardo al ora epoko de la E-movado en (precipe) Svedio kun aparta atento al unu el ĝiaj protagonistoj. € 18,00

Tri fontoj kaj tri partoj de la marksismo. Anarĥismo kaj socialismo. Pri la slogano de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo. La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a internacio. La diferenco en la eŭropa laborista movado. Antaŭparolo al Buĥarin: "Mondekonomio kaj imperiismo". V.I. Lenin. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 40p. 21cm. ISBN 9782918300533. € 7,50

Vivo de Elegabal, La. Elio Lampridio. El la latina trad. G. Berveling. Zwolle: VoKo, 2011. 48p. 20cm. Ĉi tiu "biografio" de la romia imperiestro montras ke la malbona ĵurnalismo ne estas de hieraŭ. € 7,50


Vojaĝo en Nagasako. Gvidlibro pri la historiaj kaj ekzotikaj urboj. Kompilis Hukahori Y., Kacuta K., Nakao S., Nishi

N., Doi Ĉ., Moriwaki Y. Yokohama: Montaro, 2010. 47p. 21cm. Abunde ilustrita. € 11,10

NELIBROJ

107 krucenigmoj en Esperanto. Stano Marček. Ilustris Stano Markovič kaj Linda Marčeková. Martin: La aŭtoro, [2011]. Kompaktdisko kun printeblaj kaj projekcieblaj diversgradaj kruc(vort) enigmoj en formatoj jpg kaj pdf. Kun la solvoj de la enigmoj. Komputila KD. € 15,00

Barlastono bis! Prelegas: I. Lapenna, M. Boulton, J. Camacho, G. Berveling, L. Vulfovič, D. Lord, R. Corsetti, W. Auld. Barlaston: EAB, 2011. 14 diskoj. Suma daŭro: 16,5 h. 11 elstaraj prelegoj el la 1980aj kaj 1990aj jaroj + registraĵoj el la Brita Esperanto-Kongreso en Stoke-on-Trent (1989). DVD. € 49,50



Brassens plu. Kantas Jacques Yvart. El la franca trad. Piron, Redulez, Lagrange, Bernard, Haveman, Legeay k.a. Donneville: Vinilkosmo, 2011. 41min. Kun tekstobroŝuro. 13 kanzonoj de fama franca poeto-kantisto. KD. € 18,00

Esperanto direkt. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la svedan trad. K.-G. Gustafsson. Martin: La aŭtoro, 2011. ISBN 9789185288373. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por svedlingvanoj en formato pdf, kaj voĉlegitaj tekstoj de la libro en formato MP3. Komputila KD. € 15,00

Esperanto metodą bezpośrednią. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la polan trad. S. Mandrak. Martin: La aŭtoro, 2011. ISBN 9788089312177. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por pollingvanoj en formato pdf, kaj voĉlegitaj tekstoj de la libro en formato MP3. Komputila KD. € 15,00

Esperanto mutkattomasti. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la finnan trad. T. Grundström. Martin: La aŭtoro, 2011. ISBN 9788089312146. Komplete

Sumoj en eŭroj.

DUMVIVAJ MEMBROJ:

Brazilo: A.E. Werneck Dias.

SOCIETO ZAMENHOF: Francio: F. Lo Jacomo, Louise & Jean Marin. Kroatio: Katja & Ivo Osibov. Nederlando: R. Bossong. Svedio: R. Lindblom. Usono: R. Swenson.

PATRONOJ DE TEJO: Finnlando: J. Pietiläinen. Hungario: P.P. Denke. Usono: S. Cobb.

DONACOJ ĝis la 15-a de junio 2011:

Kapitalo Afriko: Hispanio: M. Parra 300,00. *Sumo ĉi-jara*: 642,08.

Konto Afriko: Aŭstralio: H. Green 70,00. Japanio: M. Isaki 100,00. Nederlando: C. & R. Bossong 50,00; G.A.M. van Bergeijk 100,00. *Sumo ĉi-jara*: 6055,27.

Fondaĵo Ameriko: Aŭstralio: H. Green 70,00. Japanio: M. Isaki 100,00. Svedio: J. Hammarberg 22,25. **Agado A. Nijs**: Aŭstralio: H. Green 70,00. Belgio: F. Witdoeck 200,00. Britio: G. Sutton 100,00. *Sumo ĉi-jara*: 719,00.

Fondaĵo Azio: Japanio: K. Kai 25,97; S. Oonisi, A. Saiki, T. Saitō – po 17,32; E-Rondo de Gumma 86,58. Nederlando: B.

Muizelaar-Borger (Indonezio) 200,00. *Sumo ĉi-jara*: 1026,58.

Fondaĵo Canuto: Aŭstrio: U. Stecher 10,00. Britio: G. Sutton 100,00. Germanio: G. Macioszek (Egiptio) 150,00. Italio: R. Clerici 50,00. Nederlando: A. & H. Bakker 1000,00; R. Moerbeek 125,00; A. van Zeist 155,00. Usono: J. Amis 142,86. *Sumo ĉi-jara*: 4040,61.

Fondaĵo Espero: Aŭstralio: H. Green 70,00. Italio: A. Andrei (Japanio) 50,00. *Sumo ĉi-jara*: 686,05.

Fondaĵo Junularo: Nederlando: R. Moerbeek (Indonezio) 75,00. *Sumo ĉi-jara*: 125,00.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Svedio: A.-K. Krondahl 31,15. **Agado indonezianoj al UK**: Belgio: H. Deceuninck 30,00. Nederlando: I. Emmelkamp 20,00; J. Hoobroeckx 10,00; R. Moerbeek 85,00; La Jarkunveno de Esperanto Nederland 30,00; Malferma Tago de CO: 105,00. *Sumo ĉi-jara*: 2142,90.

Biblioteko: Nederlando: G.A.M. van Bergeijk 100,00. *Sumo ĉi-jara*: 831,75.

Ĝenerala kaso: Francio: R. Triolle 144,30. Nederlando: Anonima 10,00. *Sumo ĉi-jara*: 1347,06.

Al ĉiuj koran dankon! UEA

ilustrita 22-leciana kurso por finnlingvanoj en formato pdf, kaj voĉlegitaj tekstoj de la libro en formato MP3. Komputila KD. € 15,00

Esperanto prin metoda directă. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la rumanan trad. I. Oneț. Martin: La aŭtoro, 2011. ISBN 9788089312023. Komplete ilustrita 22-leciana kurso por rumanlingvanoj en formato pdf, kaj voĉlegitaj tekstoj de la libro en formato MP3. Komputila KD. € 15,00

Esperanto prjamym metodom. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la rusan trad. Br. Ĉupin. Martin: La aŭtoro, 2011. ISBN 9788096966721. Komplete ilustrita 22-leciana kurso por ruslingvanoj en formato pdf, kaj voĉlegitaj tekstoj de la libro en formato MP3. Komputila KD. € 15,00

Esperanto via de directe methode. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la nederlandan trad. J. Bosse, M. v. Erp, Luc v.d. Hoek, R. Moerbeek. Martin:

La aŭtoro, 2011. ISBN 9788089312009. Komplete ilustrita 22-leciana kurso por nederlandlingvanoj en formato pdf, kaj voĉlegitaj tekstoj de la libro en formato MP3. Komputila KD. € 15,00

Kanti gefratoj kune. Kantas: Tova Ben-Cvi kaj Chantal. Tel-Aviv: ELI, 2011. Kun tekstobroŝuro. Du kantistinoj regalas

nin per po 16 hebreaj kaj jidaj kantoj. Du kompaktdiskoj kun suma daŭro de 85min. € 15,00



Helpo al Esperanto-bibliotekoj

Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen helpas denove Esperanto-bibliotekojn pliriĉigi siajn kolektojn.

Tiu fondaĵo de UEA subtenos ĉi-jare jam por la 15-a fojo bibliotekojn, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Lastjare naŭ bibliotekoj ricevis librojn kun la valoro de 100 ĝis 200 eŭroj.

Por peti subvencion, oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj. Diskoj k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro papere (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ rete al direktoro@co.uea.org.

Kun la vivo kaj agado de la Esperanta poeto Poul Thorsen (1915-2006), kiu kun sia edzino donacis la bazan bonhaston de la fondaĵo, eblas konatiĝi per la retejo www.poulthorsen.dk.

Renesanco de kroataj kongresoj

Ankoraŭ dum la preparoj, unu el la aliĝintoj taksis la 9-an kongreson de kroataj esperantistoj "renesanca", ĉar ĝi realigis tute novajn ideojn kaj manierojn en la laboro de la organizantoj.

La kongreso okazis en Bjelovar, urbo en kiu ne funkcias Esperanto-societo, sed kie la ideo pri Esperanto enradikiĝis jam en 1909. La societo malfondiĝis en 1992, sed restis en la urbo multaj esperantistoj, kiuj bezonis nur impulson por reaktiviĝi. Post kiam antaŭ sep monatoj Kroata Esperanto-Ligo akceptis la proponon por kongresi en Bjelovar, nur 90 kilometrojn de Zagrebo, la 10-membra LKK tre baldaŭ montris, ke tiu kongreso estos multflanke escepta. Aŭspiciita de la Urbo Bjelovar kaj Departemento Bjelovar-Bilogora, kaj subtenata de multaj sponsoroj, la kongreso ofertis tre riĉan kaj tre malmultekostan kongresumadon. En la antaŭkongresa tempo estis organizita ekspozicio pri Esperanto en la Popola biblioteko "Petar Preradović", distribuitaj 5000 ekzempleroj de kolora informprospekto pri Esperanto al ĉiuj mezlernejoj en la urbo kaj gvidita Esperanto-kurso.

La kongreso okazis en la loka Kulturdomo la 14-an kaj 15-an de majo 2011, omaĝe al la 100-jariĝo de la aperigo de la unua literatura libroforma traduko el la kroata, respektive de *La trezoro de l' oraĵisto*, tradukita de bjelovarano Fran Kolar-Krom (1877-1927), cetere fondinto de la Esperanto-societo en 1909. Tiukaze, la kongreson partoprenis ankaŭ lia nepino Mirjana Hnilička el Beogrado (Serbio).

La 13-an de majo en la prestiĝa Urba muzeo, la historian (kaj parte filatelan) ekspozicion "Esperanto en Kroatio", organizitan plejparte el materialoj de Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac, malfermis la urbestro Antun Korišec. Li malfermis ankaŭ la kongreson la 14-an de majo, antaŭ ducento da kongresanoj kaj gastoj, kiuj reprezentis 10 landojn kaj 34 kroatajn urbojn. La kongreson vizitis organizitaj grupoj el Rijeka, Osijek, Zagrebo (por kiuj estis organizita speciala buso) kaj Budapeŝto.



En la labora parto de la kongreso la prezidantoj de Kroata Esperanto-Ligo (Judita Rey Hudeček) kaj Hungaria Esperanto-Asocio (Imre Szabó) subskribis la Interkonsenton pri partnera kunlaboro, kaj pri "La celoj de EEU en Eŭropa Unio" prelegis Zlatko Tišljar. La kulturalan parton karakterizis riĉa programo, en kiu partoprenis la lokaj kultur-artaj societo "Golub" (per kroataj kantoj en Esperanto) kaj "Češka obec" (asocio de ĉeĥa minoritato). Teatran adaptan de ĉapitro el *La trezoro de l' oraĵisto* preparis lernejoj de la Ekonomia kaj buroteknika lernejo el Bjelovar, trejnitaj de sia instruisto Marko Dragičević, kaj per ĉapitro el *Dek tagoj de kapitano Postnikov* (de Mikaelo Bronŝtejn) prezentigis Saša Pilipović kaj Mićo Vrhovac. Recitis poezion la aktorino Vida Jerman kaj la lernantino Dijana Ramljak, muzikis kaj kantis Neven Mrzlečki kaj lernantoj de la loka muziklernejo Fran Đerd kaj Eugen Pranjić. Prezentitaj estis tri novaj libroj: traduko de *Sklavoj de dio* de la hungara verkisto Géza Gárdonyi, pere de Esperanto kroatigita far Aleksandar Kocian el Osijek, la porinfana romano *La kapreolido Pirgo* de la kroata verkistino Anđelka Martić (kiu mem partoprenis la kongreson), tradukita de Josipa Katunar el Rijeka, kaj *La vivo de Damoru* (tradukita el la bengala de Malasree Dasgupta). La librojn prezentis Imre Szabó, Zdravko Seleš kaj Spomenka Štimec. La programon gvidis Vida Jerman el Zagrebo kaj Etel Zavadlav el Split.

Post la kultura programo estis organizitaj vizito al la ekspozicio "Esperanto en Kroatio" kaj komuna fotado en la urba parko, kaj sekvis festa tagmanĝo kun dancmuziko ĝis noktaj horoj.

La 15-an de majo por 100 kongresanoj estis organizita senpaga tuttaga ekskurso al Daruvar kaj Veliki Grđevac. Kultura programeto okazis ankaŭ en la Distra centro Kukavica, kie la kongresanoj tagmanĝis.

Okaze de la kongreso estis eldonitaj specialaj filatelaj koverto kaj poŝtkarto. La 14-an de majo en la poŝtoŝeĵo de Bjelovar riceveblis speciala stampo (uzebla ankaŭ en la kongresejo ĉe speciala giĉeto de la kroata poŝto). La neesperantista eldonejo "Čvor" eldonis dulingvan "Bjelovaran gvidilon" kaj la Turisma asocio bildkartojn kun la kongresa simbolo. La tuta kongreso estis profesie filmita kaj ankoraŭ mendeblas fotoj kaj kongresa filmo.

Reprezentantoj de la LKK ankaŭ metis florkronon sur la tombon de Vilim Polašek (1910-1994), la plej grava loka esperantisto, kiu dum pli ol 40 jaroj gvidis la lokan societon.

El multaj aspektoj la 9-a kongreso en Bjelovar estis modele organizita, kaj ĝi altigis la intereson pri tiu tradicia aranĝo de Kroata Esperanto-Ligo. Pri la kongreso raportis plurfoje diversaj gazetoj, kaj dufoje estis elsendita ankaŭ televida raporto.

Josip Pleadin

Kurso kaj ekzamensesio en Burundo

Inter la 13-a kaj la 28-a de aprilo 2011 Mirejo Grosjean el Svislando, prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono (IEK), restadis en Burundo.

La unuajn kvar tagojn Mirejo pasigis en la ĉefurbo Bujumburo, kie ŝi faris serion da televidaj kaj radiaj intervjuoj, vizitis porjunularan ministerion kaj renkontiĝis kun la prezidanto de la nacia parlamento.

Mirejo instruis en Rumonge dum 5 tagoj 43 gejunulojn. Gramatiko, didaktiko, ĝeneralaj scioj pri la lingvo kaj la movado, prelegoj kaj debatoj plenigis ĉiutage ok horojn. Venis multaj demandoj, rimarkoj, komentoj, diskutoj el la vicoj de la gestudentoj.

Sekvis la ekzamensesio kun 41 kandidatoj. Kvarhora skriba parto lacigis la junulojn, tamen por obteni internacian diplomon, ili travivis tion kuraĝe. La Loka Ekzamena Komisiono konsistis el tri membroj de Internacia Rajtigita Ekzamenantaro (IRE): Japhet Bayori



Ntunswenimana, Jérémie Sabiyumva kaj Mirejo Grosjean. Longaj korektlaboroj okupis ilin dum plena tago. Sekvis la parola parto, en kiu ĉiu kandidato devas paroli dum 20 minutoj. Sume tio daŭris 13 horojn, dum kiuj la kandidatoj montris elstarajn kapablojn. Fine 13 kandidatoj obtenis la elementnivelan diplomon kaj 12 la meznivelan diplomon. Fiere ili ricevis la verdan atestilon de ILEI / UEA.

La kurso kaj ekzamenoj povis okazi pro forta subteno de Fondaĵo Hans el Nederlando. Asocioj kaj privatuloj donacis materialon, Mirejo atingis Burundon kun du plenaj kaj pezaj valizoj. Mirinda estas la nivelo de la burundaj esperantistoj, kiuj ofte lernas en tre malfacilaj kondiĉoj, sen libroj, retaliro, sen vojaĝebloj. Por sendi lernmaterialon: ANEB, pf 170, Rumonge, Burundo.

Mirejo Grosjean

Florbukedoj memore al la Holokaŭsto



Lunde la 2-an de majo, en la holokaŭsta tago, okazis memorceremonio en Jad Vashem, Jerusalemo. Kiel en la lastaj kvin jaroj, inter la cent bukedoj (i.a. de la prezidento Peres, ĉefministro Netanjahu, vicestro de la Kneset, ĉefo de la Sochnut Natan Sharanski kaj urbestro de Jerusalemo Nir Barkat) estis la bukedo de Esperanto-Ligo en Israelo kaj de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi estis metita de Malka Zemeli kaj Amri Wandel. Estis interesa koincido ke la sekva en la buked-vico estis la bukedo de judoj el Bjalistoko, kaj la antaŭa estis prezentita de Cvi Sefet, de la urbo Slonim, kies parenco estis Josef Kohen Cedek, unu el la pioniroj de Esperanto en Jerusalemo. Post la anoncado de la bukedo de ELI, alparolis nin profesoro de la universitato Ben Gurion, kiu metis la bukedon nome de la libiaj judoj, kaj rakontis ke de la infanaĝo li interesiĝas pri Esperanto, sed ne sciis ke troviĝas esperantistoj en Israelo. Siavice en la ceremonio en la palaco de nomoj Malka legis la nomojn de la familianoj de Zamenhof murditaj en la Holokaŭsto.

Amri Wandel
Prezidanto de ELI

Mauri Ahlstedt (1934-2010) mortis la 27-an de decembro en Vantaa (Finnlando). Dum kelkaj jaroj li estis delegito kaj fakdelegito pri biciklado.

Diana Aitai (1988-2011) perdis sian vivon en tragika akcidento la 26-an de januaro en Pärnu (Estonio). Ŝi lernis E-on denaske kaj partoprenis kun sia patro Peeter la UK-ojn en Roterdamo (2008) kaj Bjälstoko (2009).

Eva Bork (1926-2010) forpasis la 28-an de decembro en Berlino. Ŝi estis regula membro de Societo Zamenhof kaj iam fakdelegito pri sociala laboro.

Edmond Brent (1936-2011) mortis la 19-an de januaro en Montrealo (Kanado). Li elmigris el Germanio al Kanado en 1957 por labori ĉe la eldonejo Esperanto Press de ges-roj Eichholz. Li estis fakulo pri socilingvistiko, pedagogia lingvistiko kaj terminologio. En 1973 li kunorganizis SAT-kongreson en Toronto. Tie li kolektis sonregistraĵojn por esploro pri la variado de la E-prononcado, pri kiu temo li prelegis en la Asocio de Modernaj Lingvoj MLA samjare. En 2008 li kunorganizis la 7-an Tutamerikan Kongreson de E-o en Montrealo.

Rodolfo G. Calógero (1923-2011) forpasis la 15-an de februaro en Neuquén (Argentino). Liaj avo kaj patro estis e-istoj kaj li mem lernis la lingvon en 1937. Dum ilia restado en Argentino li konatigis i.a. kun E. Lanti kaj T. Sekelj. En 1941 li kunfondis Argentinan E-Ligon. En 1980 li kunorganizis la 2-an Tutamerikan Kongreson de E-o en San Luis. Calógero estis dumviva membro de UEA kaj SAT, ĉefdelegito-peranto de UEA (1996-2002), fakdelegito pri krimologio, regula membro de Societo Zamenhof kaj Patrono de TEJO.

Josef Cink (1933-2011) mortis la 11-an de februaro 2011 en Červená Voda (Ĉeĥio). Li verkis lernolibrojn, ekzercaron kaj korespondan kurson por ĉeĥoj, kaj aktivis en la ekzamena komisiono de Ĉeĥa E-Asocio. Li ankaŭ tradukis kaj kompilis tri kajerojn de *Junulara kantareto* (1960, 1968, 1980).

Manashi Dasgupta (1928-2010), renoma verkisto, edukisto kaj kantisto, forpasis la 15-an de decembro en Kolkato (Hinda Unio). Ŝi scipovis Esperanton, sed ŝiajn du esperantigitajn verkojn, *Mi juna* (1989) kaj *Dormanta hejmaro* (2007), tradukis la filo Probal Dasgupta.

Norman H. Divall (1914-2010) mortis en Plymouth (Britio). Li estis membro de UEA ekde 1944 kaj longtempe delegito.

Mogen Groth Jørgensen (1913-2011) forpasis la 24-an de decembro en Hvidovre (Danio). Li eklernis E-on post hazarda vizito ĉe Zamenhof-vespero en decembro 1942. Li aktivis en la SAT-medio, en la landa ekzamenkomisiono kaj

grave helpis en la redaktado kaj administrado de *Norda Prismo*, precipe dum la periodo de W. Auld 1967-1974.

Jacobus K. (Ko) Hammer (1928-2011), em. instruisto, forpasis la 4-an de junio en Zaandam (Nederlando). Pli frue fakdelegito pri skoltismo, li estis delegito de UEA ekde 1993. Li verkis *Skolta kaj tenduma terminaro* (1963; 2-a eld. 1974) kaj la popularan lernolibron *Jamborea lingvo* (1969; 3-a eld. 1994). Ekde 1992 li redaktis la revuon *Fen-X* de Esperanto Nederlando.

Kido Fusacugu (1934-2011), dumviva membro de UEA, mortis la 26-an de marto en Kosigaya (Japanio).

Daniel Kolker (1935-2010) mortis la 23-an de decembro en Tel-Avivo (Israelo). Esperantisto ekde 1957, li aktivis en Sovetia E-Junularo, prezidis E-klubon en Zaporozje kaj gvidis amasan korespondan E-kurson en Sovet-Unio. Ekde 1992 li vivis en Israelo, kie li estis vicredaktoro de *Israela Esperantisto*. Li verkis kaj tradukis poezion kaj estis dumviva membro de UEA.

Dies Krombeen (1923-2011) forpasis la 13-an de majo en Kapelle (Nederlando), kie li estis delegito. Li estis dumviva membro de UEA.

Karin Lencki (1935-2011) mortis la 12-an de februaro en Buchholz (Germanio). Ŝi estis delegito kaj en la 90-aj jaroj prezidanto de E-Ligo de Malsupra Saksio.

Nelly Kálmáné Máthé (1926-2010) mortis en Pécs (Hungario), kie ŝi estis vicdelegito.

Ronilson Menezes Mota (1957-2011) mortis la 26-an de januaro en Salvador (Brazilo). Li kunfondis E-Societon de Salvador kaj tradukis en la portugalan la lernilon de la Zagreba metodo, *Aprenda Esperanto* (1993).

Carlo Nicolodi (1940-2011) mortis la 7-an de februaro en Allschwil (Svislando). Li estis dumviva membro de UEA kaj aktiva en Komunista E-ista Kolektivo.

Nishimura Nachiko (1930-2011) mortis la 13-an de marto en Uji (Japanio). Ŝi estis dumviva membro de UEA kaj dum kelkaj jaroj prezidanto de la E-Rondo de Uji/Jōjōo.

Erkki Rasku (1922-2011) mortis la 22-an de januaro en Lempäälä (Finnlando). Li estis multjara delegito kaj verkis la rememorojn *La frato* (1990) kaj *Iu finna infanaĝo* (1995).

Mustafa Resulović (1924-2011) forpasis la 19-an de majo en Sarajevo. Dumviva membro de UEA, li estis fakdelegito pri ĵurnalismo kaj komitatano A por Jugoslavio E-Ligo (1983-1986). Li estis prezidanto de JEL kaj de E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino. De 1994 ĝis 1995 li redaktis la radioelsendojn *Esperanto el Sarajevo*. En *Spite al ĉio, Bosnio* (1997) aperis

liaj artikoloj verkitaĵ por la elsendoj.

Asta Schaedel (1927-2011) mortis la 21-an de februaro en Malmö (Svedio). Ŝi estis multjara delegito kaj fakdelegito pri joko.

Ib Schleicher (1924-2010) forpasis la 21-an de novembro en Brønshøj (Danio). Li lernis E-on en 1950. En la 60-aj jaroj li modele kunorganizis en Danio la nomkolektadon por la peticio de UEA al UN. Li estis prezidanto de la landa E-asocio 1969-1979 kaj Komitatano A de UEA 1971-1977. En 1974 aperis lia E-lernilo *Systematikken i Esperanto*. Li tradukis la belajn eldonojn de *La marvirineto* (1962) kaj *La novaj vestoj de la imperiestro* (1964) de H.C. Andersen kaj la enciklopedion pri la seksa vivo *ABZ de amo...* (kun A. Weide; 1972). La ĉefa traduka kontribuo de Schleicher konsistis el multaj verkoj de Martinus, i.a. *Logiko* (1962) kaj *La tria testamento* (3 vol.; 1998-2005). Mem li verkis enkondukon al la ideoj de Martinus, *Objektiva vivkoncepto* (1963).

Hermann Schmid (1922-2011) mortis la 25-an de februaro en Augsburg (Germanio). Li estis prezidanto de la loka grupo en Augsburg 1968-1980 kaj kunfondinto kaj honora prezidanto de Bavara E-Ligo. Li estis ĝenerala sekretario de Germana E-Asocio kaj Ĉefdelegito de UEA, delegito de UEA 1961-2010, ekzamenanto de Germana E-Instituto kaj honora membro de Germana E-Asocio. Schmid estis sekretario de LKK de la 70-a UK en Augsburg (1985), kie li organizis ankaŭ tri Germanajn E-Kongresojn kaj tri kongresojn de SAT. Li aŭtoris la humuran poemaron *La gaja forĝisto* (1976).

Karl-Hermann Simon (1930-2011), specialisto pri la forsta terminologio, forpasis la 28-an de marto. Li estis estrarano de E-Asocio de Germana Dem. Respubliko GDREA antaŭ 1990 kaj gvidanto de Internacia Forstista Rondo E-lingva. Li precipe konatigis pro la multlingva forstfaka vortaro *Lexicon silvestre*. En 2010 aperis liaj metodologiaj eseoj, *Lexicon silvestre. Kontribuoj pri la multlingva vortaro de la forstfako* (red. D. Blanke kaj S. Panka).

Henry E. Studer (1935-2011) forpasis la 10-an de februaro en Davis (Kalifornio, Usono), kie li estis delegito kaj fakdelegito pri agrikultura maŝinaro.

Ulpiano Villanueva (1917-2010) mortis la 12-an de decembro 2010 en Lima (Peruo). Li lernis E-on en 1955 kaj estis prezidanto de Perua E-Asocio de 1976 ĝis sia morto. Li partoprenis multajn UK-ojn kaj instruis E-on al plimulto de la nunaj peruaĵ e-istoj.

Rosalind Walters (1930-2011) forpasis la 9-an de marto en Londono. Ŝi aktivis en Londona E-Klubo kaj kiel korektisto de korespondaj kursoj, kaj multe helpis afrikajn e-istojn.

SCIU PLI...

...PRI LA LINGVO



Esperanto estas... Prezentado de Esperanto kiel lingvo taŭga por ĉio, uzata plurmaniere, lernebla kaj lerninda, lingvo de la estonteco. Partizánske: Espero, 2008. DVD por komputila uzo. € 4,50. Sesona rabato ekde tri ekz.

Esperanto elektronike. La plej ampleksa kaj la plej bunta kaj kompleta materialo pri la internacia lingvo Esperanto. Partizánske: Espero, 2006. DVD por komputila uzo. € 4,50. Triona rabato ekde tri ekz.




...KAJ ĜIA AŬTORO



Ĉio komenciĝis ĉe la Verda. Zbigniew Romaniuk, Tomasz Wiśniewski. El la pola trad. P. Wierzbowski. Konciza, sed bone dokumentita verko, celanta unuavice pollingvanojn. Dulingva (pola, E). Bind. Ilus. Łódź: Księży Młyn Dom Wydawniczy, 2009. 2x50p. 24cm. ISBN 9788361253617. € 8,40. Sesona rabato ekde tri ekz.

Vivo de Zamenhof. Edmond Privat. Red. Ulrich Lins. Klasika biografio de Zamenhof, kun priskribo de liaj filozofiaj, lingvaj kaj movadaj ideoj kaj agadoj. Ilus. Rotterdam: UEA, 2007 (6-a eld.). 171p. 18cm. ISBN 9789290170976. € 9,00. Triona rabato ekde tri ekz.



...PRI UEA




La Asocio. Skizoj kaj studoj pri la historio de UEA. Ziko van Dijk. Kolekto de studaĵoj okupigantaj pri, precipe, Biblioteko Hector Hodler, la Statutoj de UEA, kaj la Historioj de Esperanto. Aldone, pli leĝeraj kontribuaĵoj pri diversaj temoj kaj eventoj. Ilus. Antverpeno: FEL, 2008. 301p. 21cm. ISBN 9789077066379. € 22,80. Sesona rabato ekde tri ekz.

Utila Estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA. Ulrich Lins. Konciza retrorigardo al la unuaj cent jaroj de UEA. Ilus. Rotterdam: UEA, 2008. 126p. 24cm. ISBN 9789290171058. € 15,00. Triona rabato ekde tri ekz.



...KAJ ĜIA CENTRA OFICEJO



La Centra Oficejo de UEA en vortoj. Gbreglo Koffi. Kvazaŭpromeno tra la CO de UEA, kun priskribo de ĝiaj ĉambroj kaj ĉiutaga laboro. Lomé: Fondaĵo Afriko, 2002. 46p. 21cm. € 4,80. Triona rabato ekde tri ekz.

Vizito al la Centra Oficejo. 24-minuta dokumenta filmo pri la CO de UEA dum ĝia Malferma Tago en novembro 2005. Rotterdam: Espero/UEA, 2006. DVD. € 9,00. Triona rabato ekde tri ekz.



LIBRO DE AMO

*"Leganto, se vi estas pruda
Kaj naŭzas vin la amo nuda ..."*

... tiam nepre ne aĉetu ĉi tiun faman majstroverkon de la Esperanta erotika poezio, kiu malkovris al tiom da geesperantistoj la misteron kaj belon de sekso.

Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos: Je la ŝildanonco de "L'Akacio", 1969. 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran *Sekretaj sonetoj* (1931) k.a. Prezo: €6,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.



Kopenhaga kongreso koverte!

Glumarkoj (ø3cm) por la ĉi-jara UK haveblas ĉe la Libroservo de UEA. 12-peca folio kostas €0,90. Triona rabato ekde 3 folioj.

La periodaĵoj de UEA kaj TEJO bonvenigas ankaŭ vin kiel sian leganton en 2011!

Esperanto

11 numeroj jare, kun po 24 paĝoj numere. €38,00*


KONTAKTO

6 numeroj jare, kun po 24 paĝoj numere. €23,00*

*La prezoj varias laŭlande. Konsultu la kotiztabelon de UEA. Abonu rekte de UEA, aŭ pere de via landa peranto.

Rikolto de 50 jaroj

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindek de miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. — Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto. Ekzemple, dum mia vivo mi verkis versajne centojn da librorcenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al tempo mi pliprofundigis en la koncerna afero, kaj la rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literatursplora laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)




La libro estas aranĝita en kvar sekcioj: Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo. Tre bela grafika prezento.

PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj. William Auld. Rotterdam: UEA, 1997. 348p. 21cm. ISBN 92 9017 052 2. Prezo: €15,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

OMAĜE AL AULD KAJ BOULTON

En 1999 William Auld kaj Marjorie Boulton festis sian 75-an datrevenon. Okaze de la jubileo UEA donacis al ili festlibron, en kiu pluraj kontribuantoj prilumas ilian verkistan karieron kaj analizas iliajn verkojn. Aliaj eseoj traktas aktualajn temojn de la movada kaj kultura vivo de Esperantujo.



Kontribuis V. Benczik, G. Berveling, W. Bormann, J. Camacho, P. Daŝgupto, S. Fiedler, P. Gubbins, T. Huĝimoto, R. Jaderstrom, E. de Kock, A. Korjenkov, Laŭlum, Mao Zifu, G. Mattos, S. Maul, A. Montagut, S. Pokrovskij, B. Ragnarsson, M. de Seabra, G. Silfer, H. Tonkin, L. Trifonĉovski kaj J. Wells. Kun la bibliografioj de Auld kaj Boulton fare de C. Cimpă.

LINGVA ARTO. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton. Red. Vilmos Benczik. Rotterdam: UEA, 1999. 5+217p. 21cm. ISBN 92 9017 064 6. Prezo: €15,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.